

Germana Esperantisto

Der Deutsche Esperantist

Oficiala Organo de
Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.)
kaj de aliaj esperantistaj unuiĝoj

Aperas duonmonate en du alternantaj eldonoj:
Eldono A (Propagando) — Eldono B (Literaturo)



Offizielles Organ des
Deutschen Esperanto-Bundes E. V.
und anderer Esperantisten-Vereinigungen

Erscheint halbmonatlich in zwei abwechselnden Ausgaben:
Ausgabe A (Propaganda) — Ausgabe B (Literatur)

Abonprezo: por jaro 2.400 Sm. (Provabono por duonjaro, komen-
ciĝanta en Januaro kaj Julio, 1.200 Sm.). Ĉiu eldono aparte:
1.200 Sm. (0.600 Sm.). Anoncoj: Vidu tarifon sur la kovrilo

Bezugspreis: für ein Jahr 4.80 M (Probeabonnement für ein Halb-
jahr, beginnend im Januar und Juli, 2.40 M). Jede Ausgabe ein-
zeln: 2.40 M (1.20 M). Anzeigen: Siehe Tarif auf dem Umschlag

Redaktoro: Friedrich Ellersiek, Berlin S 59, Wissmannstr. 46

Aisenditajn artikolojn la redakcio laŭ bezono korektas. Naperisitaj manuskriptojn ni redonas nur, se oni aldonis poŝtmarkon por la resendado

11^a Jaro N^o 8—10B

Eldonejo kaj Redakcio: Dresden-A. 1, Struvestr. 40

Aug.-Oktbr. 1914

Enhavo: Al niaj legantoj! — Über meine Kongressreise nach Paris — Esperanto kaj Ruĝa Kruco en mondmilito — Pupoj — El la vivo en Rusa Polujo — El la vivo kaj sciencoj — El kaj pri la milito — Nekrologio — Tra Esperantujo — Grafologia fako — Por kolektantoj — Diversaj komunikoj — Bibliografio — Por lertuloj — Humoraĵoj — Anoncoj

Al niaj legantoj!

Pro la milito ni por kelka tempo devis interrompi la eldonadon de nia gazeto. La subita eksplodo de la terura interpopola batalo alportis unue absolutan halton de la interkomunikiĝo: la poŝtekspedo al eksterlando estis haltigata parte tute, parte ĝuste por fremdlingvaj sciigoj kaj presajoj, kaj ankaŭ en Germanujo mem kelkaj provincoj estis tuŝataj per la laste dirita cirkonstanco. Plue la sekvoj de la milita eksplodo dum la unuaj semajnoj pezigis la komercan vivon tiel forte, ke ni devis timi kelktempan ĉeson de nia Esperanto-negoco. Ĉi tiuj faktoj kaj plue la cirkonstanco, ke la presejo per la mobilizado perdis Esperanto-kompostistojn, devigis nin al la komence dirita, nur pezakore farita paŝo.

Intertempe la situacio ree tiom klariĝis, ke ni nun povas daŭrigi la aperadon de G. E. Unue ni per tiu ĉi kajero postliveras la ne aperintajn numerojn 8, 9 kaj 10 de la koncerna eldono; la sekvontaj numeroj de eldonoj A kaj B ree aperos ĉiumonate, sed provizore kune je la 20^a de monato kaj en pli malgranda amplekso ol en pacaj tempoj. Pro teknikaj kaj negocaj kaŭzoj ni devas fari ĉi tiun malpliigon de la amplekso. Ni ankaŭ provizore forlasas la kovrilon kaj esperas, ke niaj abonantoj konsentos pri tio. Dum la milito la ĝenerala publiko havas ja nur malpli grandan intereson pri Esperanto, kaj krom tio ni, pro la enarmeigo de multaj abonantoj, estas atendontaj.

sufiĉe grandan mankon de enspezoj, kiun ni devas egaligi per ŝparemo je alia flanko.

La enhavo de nia gazeto dum la milito, precipe tiu de eldono A, akordiĝos kun la nuntempaj cirkonstancoj. La raportojn pri la internacia Esperanto-movado ni estas devigataj ellasi, ĉar ni nuntempe ne ricevas eksterlandajn Esperanto-gazetojn. Ankaŭ la cetera Esperanta vivo tutkompreneble estas malpli vigla. Anstataŭ la ellasitaj rubrikoj ni en eldono A publikigos sciigojn pri niaj amikoj, kiuj por defendo de la honoro de Germanujo kaj Aŭstrio-Hungarujo staras sub la standardoj, kaj ni ankaŭ paroligos ilin, publikigante leterojn el la militkampoj. Por tio ni tre deziras la viglan helpon kaj la peron de niaj hejme restintaj legantoj kaj amikoj. Eldono B ĉefe konservos la ĝisnunan enhavon, nur iam kaj iam ni aperigos ankaŭ en ĝi sciigojn kaj priskribojn de sur la militejo. Pritraktojn pri la kaŭzoj kaj pri la politikaj kunaperaĵoj de tiu ĉi mondmilito ni laŭeble evitos, konsiderante nian internacian legantaron. Ni ne estas vokitaj, por juĝi pri la iniciintoj de la mondbrolo kaj pri iliaj agoj; certe ili ne evitos la merititan punon. Kiu sin volas informi el Esperantaj presajoj pri la stato de la milito mem, legu la broŝurojn eldonitajn de germanaj esperantistoj; ili estas anoncitaj sub „Bibliografio“ kaj en la anonca parto de tiu ĉi kajero.

Por informo ni ankoraŭ rimarkigas, ke la nunaj numeroj enhavas kelkajn artikolojn, kiuj jam de longe estis kompostitaj kaj kiujn ni ne volis formetigi neuzitaj.

Tiel ni esperas, ke ni ankaŭ dum la milito povos interrilati kun la plej multaj el niaj legantoj, almenaŭ en germanaj kaj neŭtralaj landoj. Ni petas ilin, laŭeble subteni nin kaj konservi al ni

sian favoron. Espereble la milito ne plu daŭros longe, kaj kiam poste la situacio estos reordigita kaj kun tio komenciĝos plua progreso de la Esperanto-movado, tiam ni ne forgesos, iamaniere kompensi al niaj fidelaj abonantoj la nunan mankon.

Eldonejo kaj redakcio

Über meine Kongreßreise nach Paris*)

Von Dr. Paul Haller, Leisnig

Bereits am 21. Juli reiste ich von Hause ab, um über Holland und Belgien nach Frankreich zu gelangen. Mein Plan war, diese mir noch unbekanntes Länder, ihre hauptsächlichsten Städte und Landschaften möglichst genau kennen zu lernen. Esperanto und die Esperantisten sollten mir dazu behilflich sein; darum bediente ich mich überall der Hilfe der Delegierten des Esperanto-Weltbundes (U. E. A.), und ich kann sagen, daß ich meinen Zweck vollkommen erreichte. Überall, in Frankfurt, Mainz, Godesberg, Köln, Amsterdam, Haarlem, Haag, Scheveningen, in Antwerpen, Brüssel, Brügge waren Esperantisten meine freundlichen Berater und Führer. Das Zusammensein mit ihnen, seien es die schönen Abende am deutschen Rhein in Mainz und Köln, oder am Strande in Scheveningen, oder inmitten der Mitglieder der Gruppe in Haarlem, oder auf dem Ausflug mit zahlreichen holländischen Esperantisten in das herrliche, kanaldurchzogene Gartenland von Aalsmeer — alles dies gehört zu meinen schönsten Reiseerinnerungen. In Haarlem tagte Sonntag, den 26. Juli, der Kongreß des niederländischen Esperantobundes, und ich hatte die Ehre und die Freude, ihm als Gast beiwohnen zu dürfen und den Holländern die Grüße der deutschen Esperantisten zu überbringen.

Dieses friedliche Bild änderte sich vollkommen mit dem Eintritt nach Belgien, das in diesen Tagen in vollständiger Mobilisation begriffen war. Überall sah man zu den Waffen einberufene Reservisten, einzeln und truppenweise, ganze Militäzüge, Pferdeaushebungen (z. B. dicht hinter den großen Strandhotels in Ostende). Am 29. Juli weilte ich in Brüssel. Ein fesselndes Bild bot das Leben auf dem Boulevard Anspach, vor allem vor der Börse, wo die neuesten Pariser Blätter, *Le Matin*, *L'Intransigeant*, *Le Petit Parisien* u. a., mit heiserem Schreien an das drängende Publikum feilgeboten wurden; ihre verhetzenden Artikel mögen einen guten Teil der Schuld an dem wahn-sinnigen Haß der Belgier gegen alles Deutsche

*) Wegen Platzmangels in der Ausgabe A erscheint dieser deutsche Aufsatz ausnahmsweise in der vorliegenden Ausgabe. Siehe auch die Berichte unter „Survoje al Paris kaj reen“ in der Ausgabe A.

Die Schriftleitung

tragen. Ähnlich wirkten die Films der Firma Pathé, die in dortigen Kinos vorgeführt wurden; das Programm lockte mich, eines dieser Kinetheater zu besuchen, und das war recht lehrreich. Hier wurde — wohl gemerkt, noch im völligen Frieden! — das Anrücken der französischen Heeresverbände gegen die lothringische Grenze auf einer Karte veranschaulicht, es wurde in einseitigster Weise die Überlegenheit des französischen Geschützes gegenüber dem Krupp-Geschütz vor Augen geführt, eine Hand zeigte in stark vergrößertem Bilde, wie die Pfanne des französischen Gewehres 8, die des deutschen dagegen nur 5 Patronen faßt, endlich wurden französische Linientruppen im eleganten Geschwindmarsch vorgeführt, hierauf *les lourds allemands* mit Schellenbaum und großer Trommel im langsamen, schwerfälligen Marsch. Armes betörtes Volk und Land!

In Brügge, wo ich in einem Esperanto-Hotel, dessen Wirt fließend Esperanto sprach, dreimal übernachtete, wurde das militärische Leben von Tag zu Tag reger: singende Soldatentrupps zogen straßenbreit daher, Fouragewagen wurden beladen, Militäzüge kamen und gingen. Ähnlich war es in Ostende, wohin ich von Brügge aus täglich fuhr. Die Kurgäste reisten in Scharen ab; dennoch herrschte noch am 31. Juli ungezwungene Fröhlichkeit, ja Ausgelassenheit am Strande, während das Kriegsgewölk sich drohend über Europa zusammensog. Noch war ich der Hoffnung, daß der Krieg vermieden würde, beschloß also, am Sonnabend, dem 1. August, mit dem Schnellzug von Ostende nach Paris zu fahren. Vorsichtshalber hatte ich einige Tage vorher die Karte, auf der man seine Ankunft melden sollte, an Fr. G. in Paris gesandt, mit der Bitte, Mitteilungen an mich bis 1. August morgens nach Ostende gelangen zu lassen. Ehe ich also die Fahrkarte löste, ging ich nochmals zum Postamt, um eine etwaige Warnung vor der Abreise in Empfang zu nehmen; nichts von alledem! Also frohgemut zur Bahn, zur langersehten Fahrt nach Paris! Auf dem Bahnsteig wogt die Menge der Reisenden, größtenteils heimkehrende französische Kurgäste, während drüben auf dem letzten Gleis soeben ein Militäzug wegfährt.

Ich sitze im vollbesetzten Wagen; alles spricht von dem zu erwartenden Krieg. Ein Mitreisender erzählt, daß er soeben von einem Schaffner des internationalen Bäderzuges gehört habe, daß Deutschland diese Züge nicht mehr über die Grenze lasse. Ich überlege, daß damit der Krieg größte Wahrscheinlichkeit gewinnt; aber jetzt möchte ich erst recht nach Paris, ein klein wenig regt sich die Abenteuerlust. Hinter Kortrijk (Courtrai) wird die französische Grenze überschritten. In Tourcoing ist Zollrevision; eine junge Französin, der ich beim Tragen ihres

schweren Gepäcks beispringe, hilft mir über die Schwierigkeiten der Zollrevision hinweg, und so komme ich bis Lille, wo ich den belgischen Zug mit dem französischen vertausche. Im Wagen werden leidenschaftliche Gespräche geführt, einer hält einen förmlichen Vortrag und versichert mit Stentorstimme: „*Nous sommes la grande nation!*“ Gott sei Dank, er steigt bald aus, aber neue Menschenmengen drängen nach, Männer, Frauen und mehr und mehr Soldaten. Vor mir steht breitbeinig ein Unteroffizier; das Gespräch dreht sich um nichts weiter als Deutschland, Frankreich und Krieg, und so wurde mir's einigermaßen schwül zumute. Denn ich konnte mich mit meinem Schulfranzösisch, das ich seit meiner Schülerzeit nicht wieder aufgefrischt hatte, unmöglich beteiligen, ohne in mir den Ausländer zu verraten; andererseits mußte mein Schweigen auf die Dauer auffallen. Da es mir nicht geraten schien, mich in dieser aufgeregten Menge als Deutscher vorzustellen, der zudem noch die Absicht hat, nach Paris zu reisen, stellte ich mich müde und halb schlafend, ließ mich aber durch das Halten des Zuges auf den Bahnhöfen immer wieder „wach“-rütteln und beobachtete mit Interesse das stetig sich steigernde militärische Treiben. Douai, Arras, Amiens folgen aufeinander. Überall Soldaten und um so mehr, je näher wir Paris kommen; mit Erstaunen sehe ich, daß das französische Militär noch immer die bunten Uniformen trägt, vielfach (doch nicht immer) die grellen roten Hosen. Die Mobilisation war an diesem 1. August in vollem Gange, allenthalben sah man Männer, zum Teil mit ihren Militärsachen versehen, zu den Stationen eilen; die Brücken waren militärisch bewacht.

6¹⁰ Uhr abends, mit einstündiger Verspätung, fuhr der Zug endlich in den Pariser Nordbahnhof ein. Schwarz ist der Bahnhof vor Menschen, durch die man sich nur mit Mühe winden kann. Ich spähe nach der Esperantoflagge oder ähnlichem; aber nichts von alledem! Als ich aus dem dichtesten Gewühl heraus war, hielt mich plötzlich ein Beamter am Rockkragen fest und sprach einige mir unverständliche Worte auf mich ein. Ich sagte mit der lebenswürdigsten Miene, auf meinen Sternweisend: „*Je suis esperantiste!*“ und merkwürdig! — er lächelte und ließ mich weiter.

So stand ich im Gewühl der Weltstadt, links und rechts ein Gepäckstück, ohne Führer, selbst ohne einen Plan von Paris, wußte nur, daß unser Kongreßbüro, der Gaumont-Palace, am Place de Clichy liegt. Da fällt mein Blick auf den Eingang zu einer Untergrundbahnstation mit einem aushängenden Plan der Stadt. Dahin ging ich, prägte mir die zu gehenden Straßen fest ins Gedächtnis und eilte nun meinem Ziele zu, in der Hoffnung, so am ersten Esperantisten und damit Helfer zu treffen. Hoch in den Lüften

über der Rue de la Fayette schwebte ein Flugzeug mit einer Trikolore, wahrscheinlich um Stimmung zu machen. Ich erreichte die Rue de Clichy, wohin ich so manchen Brief gesandt hatte. (Bekanntlich befindet sich dort das Zentralbüro für Esperanto.) Da — welche Freude! Der Esperantostern! Ein norwegischer Esperantist ist es, dessen Äusseres mir noch von Krakau her bekannt war. „Bonan tagon, samideano! Findet der Kongreß statt?“ Traurig berichtet er mir, daß er nicht stattfinden werde, und daß man noch heute abend das mittags eröffnete Esperantobüro schließen wolle. Ich eile weiter und treffe einen tschechischen Esperantisten, der mir freundlich mein Gepäck tragen hilft und mich führt. Wir treffen in der langen Straße noch mehrere Esperantisten, Franzosen und Spanier. Wir begrüßen sie kurz; denn schon winkt der Gaumont-Palace, von dessen Dache die französische und die Esperantoflagge grüßen. Ich will nach dem mit Flaggen aller Nationen geschmückten Haupteingang eilen, da — ruft nicht jemand meinen Namen? Richtig! Es ist Frl. G., die einst in Krakau in meiner Pension wohnte, und deren Bekanntschaft ich zu Pfingsten in Leipzig erneuert habe. Sie drückt mir die Hand und rät mir, sofort wieder umzukehren, das Empfangsbüro sei soeben geschlossen worden. Tiefe Trauer lag in den Mienen unserer sonst so energischen Pionierin. Meine Frage, weshalb ich keine Absage nach Ostende bekommen habe, beantwortet sie dahin, daß meine Karte mehrere Tage auf der Post zurückgehalten worden sei, sie habe sie eben bekommen. Wir verabschiedeten uns mit dem Wunsche auf ein Wiedersehen unter günstigeren Umständen. Also zurück! Noch hatte ich die Absicht, wenigstens eine Nacht in Paris zu bleiben, denn ich war müde und hatte seit vormittags nichts gegessen. Mein Begleiter erbot sich, mich nach einem Hotel in der Nähe des Nordbahnhofs zu führen. Auf dem Wege dahin sah ich, wie viele Leute mit Päckchen und Koffern zur Bahn eilten. Einer von ihnen sieht mich an, ich ihn. „Sind Sie Landsmann?“ frage ich. „Gewiß! Reisen Sie auch nach Deutschland zurück?“ „Ja, ist es denn so eilig?“ Er versichert mir, daß der deutsche Generalkonsul allen Deutschen geraten habe, noch heute Frankreich zu verlassen. „Landsmann, ich schließe mich Ihnen an!“ Gesagt, getan! Ich verabschiedete mich mit herzlichstem Danke von meinem Führer, und wir eilen dem Bahnhof zu. Auf dem Wege dahin kommt uns straßenbreit ein lärmender Zug entgegen mit Fahnen, dahinter eine Rotte junger Männer, Zivil und Militär; sie schreien im Takte: „*A Berlin, à Berlin!*“ Ihre Gefolgschaft singt die Marseillaise. Wer von den Vorübergehenden nicht den Hut abnimmt, bekommt ihn vom Kopfe geschlagen; meiner hing glücklicherweise am Westenknopf.

Ich beobachtete die Mienen der Passanten: keiner stimmt mit ein, keiner ruft „Vive la France!“ u. a. Ich hatte mir französische Kriegsbegeisterung anders gedacht.

Wir nahmen uns noch Mundvorrat mit und sind bald am Bahnhof. Aber Welch ein Gewühl, und wieviel hört man deutsch sprechen! Es sind flüchtende Landsleute. An diesem Abend sollten noch einige Züge nach der belgischen Grenze verkehren — die deutsche war schon völlig gesperrt. Aber wie eine Fahrkarte bekommen? Für dieses Menschengewühl war ein einziger Schalter geöffnet, nach dem alles drängte. Ich bewachte mein und meines Landsmanns Gepäck, während dieser versuchte, zwei Karten nach Belgien zu lösen. Fünf Viertelstunden harrete ich so auf meinem Posten und wurde Zeuge vieler ergreifender Bilder, bis mein Begleiter mit zwei Karten für Verviers zurückkehrte. Glückselig gelangten wir hinaus, und sehen den Zug noch stehen, doch als wir hinzueilen, da setzt er sich in Bewegung, und wir sehen ein, daß es Wahnsinn wäre, noch hinaufzuspringen in den überfüllten Zug, wie einzelne tun; hinter dem letzten Wagen läuft ein Mann verzweifelt nach, um die Puffer zu gewinnen. — Wir hören, daß um $\frac{1}{4}$ 10 Uhr ein zweiter Zug folgen soll, und diesmal haben wir Glück. Im Nu ist das Abteil voll; wir atmen auf. Dann kommt aber das Bewußtsein des Elends über meine Landsleute. Sie waren alle, wie ganz Paris, durch den plötzlichen Ausbruch des Krieges überrascht und davongeeilt aus ihrem Beruf, z. T. von Haus und Hof. Und doch sind sie froh, der sicheren Heimat zueilen zu können. Schließlich bricht sogar ein rechter Galgenhumor durch. So fahren wir über St. Quentin und Maubeuge nach Jeumont, der französischen Grenzstation. Es ist nachts 2 Uhr; wir alle müssen aussteigen und zu Fuß nach Erquelines, der ersten belgischen Station. Wie ein langer Zug von Verbannten zogen die Flüchtlinge mit Sack und Pack durch die finstere Nacht. Trotz der späten Nachtstunde standen einzelne Einwohner von Jeumont am Wege und höhnten „*choucrouitiers! maudits allemands!*“ Mein Begleiter kann sich nicht halten, einem derselben ein halblautes „Halt die Schn. . .!“ zuzurufen, bekommt aber sogleich einen kräftigen Fußtritt gegen den Leib, so daß sein Gepäck zu Boden fällt. Wir beschleunigen unseren Schritt und gelangen über die Grenze nach Erquelines. Hier lagerten in der großen Bahnhofshalle dicht gedrängt die Insassen des früheren Zuges von Paris; die meisten saßen oder hockten auf dem Boden, Kinder schliefen, andere schrien, auf vielen Gesichtern lagen Abspannung und Kummer, besonders zu bedauern waren Mütter mit Säuglingen. Morgens um $\frac{1}{2}$ 4 Uhr ging endlich der belgische Zug ab, ein Zug von ungeheurer Länge und dennoch bis

aufs äußerste überfüllt. Viele standen oder kauerten auf dem Boden des Wagens. Ich selbst konnte nur auf dem Boden sitzen, meine Beine zwischen etlichen anderen Beinen und Gepäckstücken, so daß sie weder rechts noch links konnten; auf mir hatte ich einen schlafenden Jungen einer Dame aus Luxemburg, die selbst noch mit zwei anderen Kindern Mühe hatte. An Schlaf war natürlich nicht zu denken, und so schaute ich hinaus auf die steilen Talwände der Sambre und Maas mit ihren prächtig gelegenen Burgen, Dörfern und Städten. Wir fuhren durch Namur und das langgestreckte Lüttich; wer von den Mitreisenden hätte damals geglaubt, daß hier der Krieg zuerst toben würde, und daß über diesen starken Festungen sobald die deutsche Flagge wehen würde? Mit einigen Hindernissen (z. B. hielt der Zug einmal plötzlich inmitten eines Tunnels eine halbe Stunde lang im Dunkeln und dann oft auf der Strecke) kamen wir nach Verviers. Während eines solchen Aufenthaltes zeigte sich plötzlich an der Außenseite des Wagenfensters ein Gesinnungsgenosse aus Kassel, der auch von Paris kam. Von der belgischen Grenzstation Welkenraedt mußten wir wiederum zu Fuß über die Grenze gehen nach Herbestal. Ich hatte noch einige Karten mit belgischen Marken in Welkenraedt aufzugeben und fragte einen am Wege stehenden Beamten nach dem Briefkasten. „Vi ja estas esperantisto!“ rief er und erbot sich, sie mir zu besorgen. So war denn der letzte Ausländer, mit dem ich auf der Reise zusammen getroffen war, ein Esperantist, wie ich überhaupt sechsmal während dieser 14tägigen Reise rein zufällig mit Jüngern Zamenhofs bekannt wurde, einzig durch das Tragen des grünen Sterns; es gibt eben mehr von diesen, als sich mancher träumen läßt.

Und nun waren wir in Herbestal, dem ersten Ort auf deutschem Boden und grüßten das liebe Vaterland und den ersten deutschen Soldaten, der unsere Papiere prüfte. Auf der Fahrt von Aachen nach Köln jubelte alt und jung den aus Paris heimkehrenden Landsleuten zu. Über Elberfeld, Halle und Leipzig erreichte ich am 3. August abends meine Heimat.

Esperanto kaj Ruĝa Kruco en mondmilito

La legantoj certe supozos, ke mi raportos pri grandegaj profitoj, kiujn la kompanioj de l' Ruĝa Kruco havas per Esperanto dum la nuna mondmilito. Tion mi tre volonte farus, sed bedaŭrinde ne povas, ĉar, kvankam oni jam de longe ekkonis kaj priparolis en la kunvenoj de l' Ruĝa Kruco la gravan utilon de Esperanto ĉe la helpo

al la vunditoj kaj malsanuloj en milito inter diverslingvaj popoloj, kvankam oni jam decidis en la lasta internacia kongreso de tiu ĉi unuiĝo en Washington, allasi Esperanton kiel kongreslingvon kaj konsili al la anoj de naciaj unuiĝoj la lernadon de tiu ĉi internacia lingvo, tamen la afero malgraŭ multaj klopodoj de la esperantistoj ĝis nun ne estas tiel progresinta, ke oni povus atendi ĝeneralan profiton. Por tio ne sufiĉas, ke la anoj de l' Ruĝa Kruco, kiuj estas okupataj je la flegado al vunditoj, scipovas Esperanton; ankaŭ la vunditoj mem devas paroli kaj kompreni Esperanton. Ekzistas ja Esperantaj helplibretoj de Bayol; sed ili estas nur nesufiĉe perfektaj helpiloj. Mi do intencas nur paroli pri la profitoj, kiujn oni povus havi, se nuntempe internacia helplingvo jam estus instruata en ĉiuj popollernejoj de civilizitaj landoj. Ĉu tio estas ebla? Laŭ la ĝisnunaj spertoj neniu povas nei la eblecon de lernado de Esperanto en ĉiuj popollernejoj.

Sed en la nuna mondmilito ankaŭ tio ne sufiĉas, ĉar la malamiko de Germanujo kaj de Aŭstrio-Hungarujo, ne fidante siajn proprajn fortojn kaj ignorante la internacian leĝon, vokis sur la eŭropan militkampon ankaŭ la sovaĝajn popolojn de Afriko kaj Azio.

Ke tiu ĉi kaj similaj rompoj de la internacia leĝo en estonteco ne ripetiĝu, pri tio certe zorgos la pactraktado je la fino de la milito.

Pli trafan pruvon por la neceseco de internacia interkompreniĝo en la ambulancoj kaj lazaretoj oni certe ne povas havi, ol tiun ĉi mondmiliton, kaj eĉ mallonga observado povas pruvi tion al ĉiu.

Laŭ la interkonsento de Ĝenevo la vunditoj kaj la malsanaj soldatoj devas esti prizorgataj kaj flegataj per tiu militanta armeo, kiu kaptis ilin. Nia militsanitaro korpuso kaj la unuiĝo de l' Ruĝa Kruco estas ĉiam pretaj, plenumi la devojn de la Ĝeneva interkonsento, sed ili bedaŭrinde tion ne povas sufiĉe bone fari: la militkuracistoj, la militaj vunditportantoj, la flegistaro kaj la geanoj de l' Ruĝa Kruco ne povas interkompreniĝi kun la vunditoj, ĉar ili ne scias ilian nacian lingvon, kaj bona interpretanto ofte mankas. Do ili ne povas konsoli la vunditojn kaj mildigi iliajn dolorojn. Ofte ili eĉ ne povas malhelpi la morton, ĉar ili ne komprenis la plendojn de la vunditoj, kaj tial ili ankaŭ ne povas plifaciligi al ĉi tiuj la lastajn vivhorojn. Por ili la fremdlingva vundito ne estas parolanta homo, sed kvazaŭ muta besto, kaj ĉio, eĉ profunda kompato al la vundito restas vana kaj ne estas komprenata.

Do devas esti nia celo, enkonduki Esperanton en la militsanitaran korpuson kaj en la unuiĝon de l' Ruĝa Kruco.

La interkompreniĝo devas fariĝi per helpo de la supre cititaj helplibretoj de Bayol, kiujn oni donu al la vunditoj. Tiuj ĉi libretoj enhavas la plej oftajn demandojn kaj respondojn en Esperanto kaj en la nacia lingvo de la vundito kune kun elparolmaniero de Esperanto laŭ nacia lingvo. La aranĝo de la frazoj estas en ĉiuj libretoj la sama; do oni povas senpene montri al la vundito, kion oni parolis. Per tiu ĉi metodo interkompreniĝo estas ebla, sed ĝi okazas malrapide kaj tute ne plene; tamen ĝi estas pli bona ol la nuna, kiu estas preskaŭ nenio.

Pli granda la profito estus, se multe da vunditoj kaj la tuta sanitara personaro estus parolantaj Esperanton tiel sufiĉe, ke ili sen helpo de la libreto povas fari demandojn kaj respondojn pri la ĉiutagaj aferoj en ambulancoj kaj lazaretoj, en domaroj, hoteloj, loĝejoj, ĉe komercistoj kaj pri aliaj ĉiutagaj diversajoj.

Tio devas esti la celo de la propagando de la esperantistoj post la milito. *)

Dro Breiger, Berlin

Pupoj

De Kurt Münzer

Fakte ŝi estis nomita Melitta, kiel la avino. Sed ĉi tiu belega nomo ja estis fro grava kaj peza por tia malgranda knabino. Cetere ŝi havis tiel nekredible orajn buklojn, okulojn bluj kiel safiroj, sur gracia vizaĝeto esprimon de netuŝebla nemondaneco kaj senkulpeco, ke oni ŝin simple nomis Pupo. Ŝi estis ankaŭ tiel ĝentila, obeema kaj pura kiel pupa infano, kaj ĉiuj homoj opiniis, ke ŝi vere meritas sian nomon. Du fratojn ŝi havis, la gracian delikatan Nikolaon kaj la malpli delikatan Viktoron. Oni nomis ilin Niki kaj Viki. Ĉar mallongecon kaj simplecon oni ŝatis en la hejmo. Niki kaj Viki havis sep kaj ok jarojn, kiam Pupo atingis la kvinan. Tamen ili estis ŝiaj plej bonaj ludkamaradoj. Pupo ne povis imagi, ke en la mondo alia knabino fartis same bone kiel ŝi kaj havis du subkavalirojn tiel sindonajn kaj eltrovemajn. Panjo estis bela, aminda kaj bona, ĝuste tiel, kiel feliĉaj infanoj imagas patrinon. Sed precipe belega viro estis paĉjo. Laŭ sia barbo, nigraj okuloj, sia grandeco kaj siaj bonfaraj manoj Pupo juĝis, ke

*) Por instruo kaj propagando en germanlingvaj landoj taŭgas ankaŭ la jenaj verkoj: *Deutsch-Esperanto-Wörterbuch für das Rote Kreuz* de Dro med. Fr. Uhlmann (vidu la bibliografian parton de tiu ĉi numero), *Der Esperantist-Samariter auf dem Schlachtfelde und im Lazarett* de E. Loose kaj *Esperanto und das Rote Kreuz*, tradukita de Leopold Elb. Ĉiuj tri libroj estas haveblaj ĉe Ader & Borel, Dresden. (Vidu la anoncan parton.) *La red.*

pli bela li estas ol ĉio alia en la mondo. Jes, ŝi opiniis, ke li, ĉar pli potenca, nepre estas pli adorinda ol Dio mem. Tial ke paĉjo estas videble, senteble aganta sorto, dum Dio certe ja nur restis sekrete kreanta principo. Sed paĉjo videble malkaŝis sian forton, riparitis difektitaĵojn, kuracis ĉiujn vundojn, fiksis ekskursojn kaj promenadojn, venigis ĉiujn bonaĵojn domen kaj eĉ, se necese, punis. En alia mondo eble Dio estis same influrita kaj potenca, sed en ĉi tiu mondo Pupo preferis paĉjon; de ĉi tiu instanco petoj kaj preĝoj efektive tuj estis plenumataj, aŭ oni almenaŭ tuj eksciis pri la rifuzo kaj ne bezonis longe resti en necerteco. La ludĉambro estis la plej bela, kiun la tri infanoj posedis. En la granda, hela ejo, kies fenestroj abundis je multkoloraj floroj, en fakoj, ŝrankoj kaj sur bretoj staris kaj kuŝis la plej multekostaj, sed tamen la plej praktikaj kaj interesaj ludiloj. Laŭlonge de la muro estis kegloludejo, sur tablo reloj serpentumis tra tuneloj kaj preterveturis staciojn, pafejeto kun arbalesto estis konstruita en angulo. La plej bela estis por Pupo ŝiaj tabloj. Jen sidis sur dekduo da neĝblanke lakitaj kanseĝetoj la sama nombro da pupoj aŭ eĉ pli de ĉia speco kaj granda, kelkaj tiel grandaj, ke la seĝeto estis tro malgranda; aliaj tiel malgrandaj, ke du aŭ tri el ili havis sufiĉe da loko sur unu seĝeto. Ekzistis blondaj kaj brunaj, dikaj kaj maldikaj kun vaksaj aŭ porcelanaj kapoj, rigidaj kaj moveblaj, mutaj kaj parolantaj, ridetantaj kaj seriozaj. Jen estis infanetoj kaj plenkreskaj, urbaninoj kaj vilaĝaninoj, fianĉino kaj kuiristino, balsinjorino kaj mastruma virino, unuj frizitaj aŭ kun disligitaj haroj, aliaj kun florĉapeloj aŭ ĉarmaj ĉapeloj; ĉi tiuj kun ombrelo kaj poŝo, tiuj kun malgrandega pupinfano en brako. Sed fine ĉio ĉi tio ankoraŭ estis nenio. Certe ekzistis dufoje tiu aŭ alia pupo, ĉi tiujn ĉapelojn aŭ baltualetojn ankaŭ alia panjo povis esti kudrinta por sia knabineto. Eĉ ne la blanka ŝranko kun sia preskaŭ neimageble granda pupdoto estis la plej bela kaj tamen pendis en ĝi dimanĉaj vestoj kaj puntaj subvestoj, sortimento da ŝtrumpoj kaj ŝuoj, eĉ peltoj kaj sportkostumoj, pantalonoj kaj skiĉapoj. Ne, la plej bela estis la nomoj de la pupoj. Ilin, paĉjo, bonhumora, helpema kiel ĉiam, estis doninta al ili kaj lia knabineto ĝojege akceptis ĉiujn. Sur ĉiu blanka seĝeto pendis papereto, sur kiu estis la nomo de la pupo. Viki, la plej aĝa, estis skribinta ĉi tiujn nomojn per sia plej akra plumo tiel bele, kiel la modelon en siaj kajeroj. Kaj kvankam fratineto ne povis legi, tamen malgraŭe ili estis tiel malfacile memoreblaj, ŝi sciis ĉiujn parkere. Ke unu estis nomita Tusnelo, alia malgranda dika Eŭfrosino, ankoraŭ ne estis gravaĵo. Sed noblan, maldikan, gracian oni nomis „Abundantia“, alian brunan iomete uzatan, „Konstantia“. Ekzistis fraŭlino „Helsingfors“ kaj sinjorino „Fili-

popelo“, tirolanino „Tinch Keastrozza“ kaj fianĉino „Nekoketu“. Senmezure ornamita vaksaka sinjorino havis la nomon „Modesta Simpleco“, kaj ekonomie vestita pupo kun longa harligo estis fraŭlino „Superba“ baronino de Luxusdorf (luksa vilaĝo). Ekzistis ankaŭ unu kun longa trenajo kaj diademo, la plej longa el ĉiuj, jam tre paliĝinta, la kortega robo iom difektita, tiu estis „Amaliannagata“ dukino de „Trivirlando“.

Ornamitaj per tiaj kaj similaj nomoj kaj rangoj la pupoj sidis bone ordigitaj kaj provizitaj je siaj nomafiŝoj, kiel ĉevaloj en ĉevalejo, en siaj seĝetoj, rigardantaj sopire per grandaj senesperaj okuloj. Pupo, ilia estrino, patrino, servistino, reĝino kaj samtempe ĉambristino, promenis antaŭ ili tien kaj reen, alparolis ilin, konversaciis pri la okazintaĵo jde la tago, vestis kaj senvestigis ilin; ornamis ilin per juveloj aŭ forprenis la ornamaĵojn, hodiaŭ ŝi detronigis la dukinon kaj faris la tirolaninon regnestrino de Trivirlando, vestis la fianĉinon per ĉiutaga robo kaj feliĉigis la maljunan Konstantion per edziniĝkroneto kaj vualo; la kuiristino fariĝis balsinjorino, la infaneto ŝanĝiĝis dum nokto en junan por-salonan sinjorinon. Bonkore, sen preteksto, pacience kaj cedeme ili ĉion akceptis. Eble fraŭlino Helsingfors, kiam oni tuŝis ŝin en sentema loko, dolore alvokis sian patron, aŭ baronino de Luksa vilaĝo, kiam oni tiris je unu aŭ du el la sekrete de la korpo pendantaj ŝnuroj, alparolis laŭ la cirkonstancoj la malproksimajn nekonatajn gepatrojn kiel paĉjon kaj panjon. Tiuj estis ŝiaj solaj animaj movoj. Certe ankaŭ la plej multaj ja povis movi la okulojn. Kiam oni ilin kuŝigis, momente ili obeeme fermis la okulojn kaj ekdormis, por tuj ĉe la unua ekleviĝo vekigi klaraj kaj satdormintaj. Vera ĝojo estis, interrilati kun ili. Ankaŭ Viki kaj Niki ne hontis amikiĝi kun tiuj ĉi sinjorinoj. Pupo kun siaj fratoj aranĝis grandajn festojn, je kiuj partoprenis la dek kvar fraŭlinoj.

Tiam Viki havis kiel najbarinon la baroninon kaj Niki la dukinon; ili nur estis kontentigeblaj per nobelino. La aliaj devis esti kontentaj unu je alia, do pro tio Pupo okupiĝis pri ĉiuj, pleje pri tiuj, kiuj laŭ ilia sociala rango kaj riĉeco de vestaĵo plej profunde estis malleviĝintaj. Tiujn ŝi kompatis kaj rekompensis precipe per bonkoraj kaj amriĉaj alparoloj. En la lasta tempo estis unu el la bonulinoj, kiu devis sin vesti per la plej malnovaj roboj. Pro tio ŝi foje pro falo ricevis seriozan rompon de kranio. Nature paĉjo tuj kuncementis la du disrompitaĵajn vizaĝduonojn, sed efektive en la rapideco de sia helpemo li malsukcesis. La buŝo ne estis bone alfarita kaj unu okulo staris pli malsupre ol la alia. La iam bela vizaĝo estis tre deformita. Pro tio la mizerulino, kiel rekompencan, ricevis anstataŭ la nuna iom senornama nomo Andalusio, la pli aludan kaj pli signifan: „Klanjo daŭrema“. Tial ŝi nun

estis karulino de Pupo kaj estis superŝutata per la plej fortegaj karesoj. Jes, Pupo eĉ intencis, vesti Klanjon daŭreman malgraŭ ĝia korpa deformiteco dum kelka tempo kiel baroninon, sed Niki kaj Viki protestis. Estus do klare, ke la regatoj de baronino ribelus kontraŭ nerekte buŝo kaj pendanta okulo. Ambaŭ deklaris, ke tian baroninon ili neniam kondukus al tablo, eĉ se ili devus kontentiĝi je la Spreewald-nutristino „Kuhsack“. Tiam Pupo cedis kaj fordonis ĉiujn esperojn al pli bona kaj pli brila estonteco de la deformita fraŭlino. Ŝi ne antaŭsentis, ke la plej malĝoja, kio povas okazi al homoj kaj aĵoj, minacas aŭ proksimiĝas al sia karulino. En la libro de la sorto estis decidita la tuta pereco de Klanjo. Iun tagon de Decembro, dum kristnasktempo, alvenis malfeliĉo kaj morto. La patro de Pupo havis sian oficejon en la urbo, sed loĝis ekstere en kvartalo de vilaoj, en malgranda rozruĝa vilao staranta en ĝardeno, kiu preskaŭ estis parko. Ĝi havis malgrandan laĝeton, sur kies mezo, sur artefarita insulo, sin spegulis ŝtona Floro; ĝi havis rozaleojn kaj tiliopromenejon, laŭbojn kaj bosketojn, kroketejon, gimnastikilojn, kuglodejon, kaj apud la fino troviĝis aleo kun mallonga tranĉita bukso, restaĵo de iam ĉi tie troviĝinta palacparko. La plej gaja parto de la infanvivo okazis en ĉi tiu bela ĝardeno, ankaŭ vintre, kiam profunde ĝi kuŝis sub neĝo. Kaj iun tagon, ne longe antaŭ kristnasko, io okazis, je kio tiu ĉi neĝkovrita parko ludis grandan kaj malĝojan rolon.

En la najbareco estis mortinta multjaraĝa sinjoro, kaj lia grandioza funebra procesio preterpasis la rozruĝan vilaon. La tri infanoj staris kun sia fraŭlino, gaja, juna skotino, apud la fenestro rigardantaj la longan procesion. Ili estis tiel okupitaj de la funebra procesio kun ĝiaj kvar ĉevaloj kaj plumblovitaj nigraj kovriloj, de la sekvantaro de multnombraj nigraj sinjoroj kaj la postsekvantaj kaleŝoj, de la du veturiloj kun la kronetoj kaj palmbranĉoj, ke ili forgesis respondi la salutojn de siaj gepatroj, kiuj partoprenis la ceremonion. Kiam paĉjo kaj panjo revenis hejmen, komencis longa detala demandado pri ĉi tiu mirinda okazintaĵo. Ili ne estis kontentaj, antaŭ ol paĉjo precizege ĉion rakontis: pri la prediko de la pastro, la beno al la ĉerko, la preĝo post enterigo kaj eĉ la konduto de la funebra sekvantaro. La vidvino maldolĉege estis ploriginta, la filo kviete malesperinta kaj la aliaj sufiĉe fremdaj, estis apudstarintaj tre trankvile kaj neekscitite. Pupo, en profundaj pensoj, diris: „Se vi mortus, paĉjo, mi ankaŭ tre plorigus. Sed mi kredas, ĉiuj plorigus“. Kaj tiu ĉi imago tiamaniere subigis ŝin, ke ŝi jam antaŭe komencis plori. Je tagmanĝo ŝi ree estis konsolita. Posttagmeze Niki havis belegan ideon, ke ili ludu enterigon. Viki kaj Pupo konsentis entusiasmitaj, kaj nur estis la

demandado, kiun oni entombigos. La profunda medito de Pupo estis maldelikate interrompata de Viki, kiu kriis: „Ni enterigu unu el la knabinoj de Pupo! Ni rapide malsanigos iun, mi estos kuracisto, levos la ŝultrojn, kaj ĝi mortos. Tiam ni tuj en la ĝardeno enterigos ŝin“. „Sub la malgranda acero!“ kriis Niki. „Mi faros la tombon.“ Kaj jam saltis la fratoj al la galerio de sinjorinoj en la blankaj seĝetoj. Sed de longe Pupo staris antaŭ ili kaj defendis heroe siajn infanojn. Ĉiuj estis sanaj kaj vivemaj; neniu ŝi volis fordoni; ĉiuj ŝi kore amis. Tiel komencis batalo pri konsento inter du honestaj viroj unuflanke kaj senhelpa knabino aliflanke. Nature Pupo estis venkata kaj estis konvinkata, ke unu el ŝiaj infanoj devus esti la ofero. Ŝi subpremis siajn larmojn dirante:

„Sed ni prenu la plej malbelan“.

„Kristnaskon vi ricevos tiom da novaj“, diris Viki traserĉante per rabemaj rigardoj la galerion da belaj knabinoj. Viki proponis la baroninon, por havi belegan ceremonion. Fine — ĉar neeble estis, ke baronina vestaĵo venu en teron — oni interkonsentis pri Klanjo daŭrema, kies anĝela karaktero kaj ĉiela obeemo ne kontraŭstaros la plej maldolĉan sorton. Ĝia groteska, jam kreventita, senformigita vizaĝo cetere ja antaŭdestinis ŝin al malsano kaj morto. Senvestiginte ŝin, oni metas ŝin en kurtenan liton kaj Viki konstatas nazkataron mortigan. La aliaj sinjorinoj aŭdigis kondolencsonojn aŭ kriis paĉjo kaj panjo. Kaj vere, Pupo ploregis apud la lito: mortis do ŝia karulino. Se ŝi nur neniel estus konsentinta pri ĉi tiu afero! Fine diris Niki, „se vi ne povas toleri tion, vi ja morgaŭ povos reelteriĝi ŝin. Sed ĉiuokaze ŝi estas enterigota, ĉar vi ja vidas, ke ŝi mortas pro sia nazkataro“. Efektive Klanjo kuŝis kun fermitaj okuloj kaj strangforma buŝo senviva kaj faris honoron al sia nomo. Fine la kuracisto diris per obtuza voĉo: „Ŝi ĉesis vivi. Kara fraŭlino Pupo, oni povas fari nenion plu. Via infano estas enterigota. Tuj ĉerkon“. Skatolon oni opiniis inda por kaŝi la terajn restaĵojn de Klanjo. Pupo vestis ĝin per hejma vestaĵo de la baronino, ĉar tiamaniere ŝi forigis ĉian malbonaĵon, almetis al ĝi rompitaĵajn ŝuojn kaj kundonis al ĝi en la tombon ankoraŭ malnovan plumĉapelon kaj disŝiritan ruĝan ombrelon sen prenilo. El la manĝoĉambro oni prenis florojn, decembrovioleojn kaj mimozojn. Viki prenis la skatolon sub la brakon kaj iris el la ĉambro, malsupren la ŝtuparon en ĝardenon. La afabla skotino rigardis ilin ride-tante. Ekstere salutis ilin la lasta posttagmeza suno. Viki, la pastro, estis vestita per grizkvadratita tuko kiel ornato, Niki per rigida nigra ĉapelo de patro kaj al Pupo oni surmetis ruĝan tablotukon, por ke kiel vidvino ŝi havu longan, kvankam ne nigran robon. Dum plorego de Pupo la procesio moviĝis al la malgranda acero,

kie Niki anstataŭ filo nun devis fariĝi tombfosisto kaj fari tombon. Sed la tero estis nun glaciiginta kaj li nur sukcesis fari sufiĉe grandan truon en la neĝo. Fine oni konsideris tion sufiĉa, kaj Viki mallevis la ĉerkon. „Preĝon“, flustris al li la filo. Kaj la pastro solene diris: „Laca mi estas, mi iras ripozi —“ Tio fakte taŭgis mirinde. Pupo estis tiel kortuŝita, ke ŝi ne povis postjeti tri plenmanojn da neĝo en la tombon. Sed la kruela pastro malpermesis al ŝi ĉi tiun doloron, ĉar nun ili ĉiuj devis prezenti la sekvantaron, kiu, kiel paĉjo rakontis, devis stari apude trankvile kaj neekscitite. Ili do starigis en unu vico, silentis kaj fikse rigardis la supron de senfolia acero. „Vidu, jen korniko!“ ekkriis Niki.

Ĉi tiun rolon li plej bone komprenis. La indiferenta sekvantaro nun disiĝis, reiris hejmen kaj nur Pupo kunprenis sian unuan maldolĉan perdon ĝis en la lito kaj dormo. Sed tiel profunda estis la doloro de ĉi tiu infana koro, ke Pupo je noktmezo ekvekiĝis pro tio. La ĉambro estis tuthela per la neĝ- kaj lunlumo, apude tra malfermita pordo sonis la trankvilaj, profundaj spiroj de la fraŭlino. Nenion, escepte tiujn kaj ekstere en la parko mallaŭtan ĝemon, aŭdis Pupo. Ŝi eksidis: certe estas Klanjo daŭrema, kiu frostas. Ŝi fartis tiel bone en sia varma lito en la ŝirmata ĉambro, sed Klanjo kuŝis ekstere en neĝo kaj frostoj . . .

La koro de Pupo batis furioze kiel alie nur atendante iun ĝojon; frostotremo skuis ŝin, kiam ŝi forprenis sian kovrilon. Ne, ŝi pli longe ne tolerus ĝin, ŝi devis rehavi sian infanon. Kaj ŝi devis rapidi. Kiel, se Dio jam efektive ŝin estis preninta al si? Se ŝi venus al la tombo kaj ĝi estus malplena, forrabita la mortintino kune kun ŝuoj, ombrelo kaj ĉapelo! Ne, tion oni ne povis finpensi. La koro de Pupo ŝvelis pro sopiro, amo kaj timo. Ŝi rampis el la lito, nur prenis sufiĉe da tempo por almeti sian noktpantofletojn kaj ekiris. Kiel kviete estis en la domo! Ĉio ŝajnis al ŝi fremda. La malvarmeta blanka lunlumo, kiu plenigis la koridorojn, pli granda kaj pli alte fariĝinta halo! Kuraĝa kaj sentima estis Pupo, ŝi ne timis kvietecon kaj ombron, ĉar ŝi nur pensis pri la savo de Klanjo daŭrema. Kurante ŝi plekis la manojn, preĝante senfine, ĉiam denove sian solan preĝeton!

„Malgranda mi estas, — pura la koro
En kiu loĝas — nur sola Dio!“

Tiel ŝi atingis la altan pezan pordon, kiu ne estis ŝlosita. Alie Pupo neniam ĝin povus malfermi. Sed nun ŝi premis la fermilon malsupren, ŝovis la pordon per ĉiuj fortoj, sin elŝtelis, fermis la pordon kaj subite glaciigis per la bloveto de la frostoj. Estis malvarmege. Glacia vento alblovis ŝian ĉemizeton. Sed nenio ekzistis, kio povis malhelpi Pupon je ŝia sopiro!

Malsupren la ŝtupojn ŝi kuris laŭ la glataj vojoj de la ĝardeno, tra la tilia aleo, preter la lageto. La ŝtona Floro staris kaŝita sub piramido da neĝo, la akvo estis glaciiginta kaj spegulis la plenlunon, kiu naĝis en frostklara aero. Eksonis horloĝo kaj Pupo ektimis. Estis la unua nokte. Sed jen la acero, jen la tombo kovrita per mimozobranĉoj. Jam Pupo estis antaŭ ĝi. Kiel malmole la neĝo estis glaciiginta. Apenaŭ ŝi povis disfosi ĝin per rigidaj fingroj. Malegoista, sindona al sia kara klopodo per la tuta memfororgesemo de infano ŝi ne atentis la dolorojn. Krom tio ŝi ne plu frostis. Kontraŭe, ŝi kun milda varmece kaj komforto plenumis sian laboron. Jam ŝi tuŝis la skatolon, ŝi forgratis la lastan glacial kruston, jen kuŝis la violoj. Ŝi disŝiris la ligilon, forprenis la kovrilon — jes, Klanjo daŭrema ankoraŭ ne flugis ĉielen. Trankvile ŝi kuŝis kun okuloj fermitaj, en negliĝo de baronino, kun ĉapelo, ombrelo kaj ŝuoj, pacience atendante la fruan reviviĝon, preta al vivo kiel al morto. Pupo suprenprenis ŝin, kiu estis iomete malseka. Klanjo malfermis siajn bluajn okulojn. Surprizon, amon, dankemon, raven Pupo kredis trovi en ili. Ŝi premis al si sian infanon, neŝanĝitan, kiel ĝi estis kun pendanta okulo kaj nereкта buŝo. Ŝi flustris al ĝi dolĉajn vortojn, sed subite ŝiaj lipoj rifuzis. Ŝajnis, ke ili rigidigis, per frostoj la vortoj frostigis. Timo, kiel fajro varmega, traflugis la korpeton de Pupo. Ŝi volis ekleviĝi kaj ne povis. Ŝi volis voki, sed estis neeble al ŝi. Ŝi ĉirkaŭrigardis senlarma kaj muta. La tuta mondo estis lumo kaj frostoj. Ambaŭ sonis kaj kantis. Pupo aŭdis mirindan muzikon, kiu fariĝis pli laŭte kaj proksimiĝis. Ŝi sentis, kvazaŭ ŝi estus kovrita per varmaj tukoj, premis al si per glaciigintaj brakoj sian infanon kaj ridante falis kontraŭ la malgrandan tumultuson . . .

Fraŭlino, la juna skotino, ekvekiĝis, lumigis la ĉambron, kantetante vestiĝis kaj preskaŭ preta iris apuden, por veki Pupon.

Je la pordo de ambaŭ fratoj ŝi jam de longe frapis kaj ricevis respondon. „Pupo!“ vokis fraŭlino, „Pupo! Pupo! Ĉu vi ankoraŭ dormas?“

Paĉjo kaj panjo rapidis el la manĝoĉambro. Ankaŭ la maljuna servisto venis en eksciteco kaj timo kaj diris paliĝante: „Hodiaŭ matene la ĝardenpordo estis malfermita.“

Estis paĉjo, kiu trovis Pupon. Rigida, senviva, glaciiginta ŝi apogis sin al la tumulto en ĉemizo kaj ŝuoj. En ŝiaj brakoj kuŝis Klanjo daŭrema kaj fikse rigardis la homojn per riproĉaj, nerektaj okuloj. Oni ne povis preni ŝin el la brakoj de Pupo. Ŝi estis savita.

Sed Pupo, ridetanta, blanka, muta, ne plu malfermis la okulojn. Kune oni enterigis ambaŭ.

El la germana lingvo tradukis

Elly Hanau

El la vivo en Rusa Polujo

Persono, kiu sukcesis transveni el Rusa Polujo Krakovon, sendis al ni kelkajn priskribojn pri sia vojaĝo. Jen ili estas:

En la urbetoj de Rusa Polujo nuntempe okazas neforgeseblaj scenoj, iafoje tragediaj-komikaj, iafoje sangaj, batantaj la cerbon kiel per martelo. La kozakaro, kiu denove eniris la vilaĝojn kaj urbetojn, regas tie laŭ sia karakteriza maniero. En Radom, kiam mi sidis en gastejo, subite galopante trakuris la straton kelkaj kozakoj, post ili ekiris la popolamaso. En la mezo oni gvidis tri judojn: unu en atlasa kaftano, la du aliaj preskaŭ en tolaĵo; ĉiuj iris palaj, preĝantaj, ĉirkaŭitaj de amaso da samreligianoj. La marŝo direktiĝis al la proksima arbareto.

— Kion tio signifas? — mi demandis.

Oni iras pendigi ilin — respondis lakone iu pasanto. — Oni kulpelis judojn, por ke ili vidu la ekzekuton.

— Pro kio?

Oni ne sciis respondi al mi. Laŭdire ili helpis la prusan militistaron. Post kelka tempo la ekzekuto estis finita kaj la popolamaso, pelita de kozakoj, revenis la urbeton.

* * *

Apud la stratangulo staras vendistino antaŭ sia butikio. Mi aĉetas unu funton da piroj, apud mi aperas du kozakoj, karabenojn sur la dorso, vipon ĉe la zono. Ili komencas plenigi la poŝojn per fruktoj. Kiam jam mankis loko en la vastaj poŝsakoĵ, ili foriras plej trankvile en la straton.

La judino ekdiras timeme:

— Funto da piroj kostas ses kopekojn . . .

Unu el la kozakoj turniĝas.

— Ses kopekojn? bonege!

Per unu piedpuŝo li renversas la korbon kun prunoj, post dua piedpuŝo piroj kaj kukoj disflugas sur pavimon, surŝutante la vendistinon, kiun intertempe la alia kozako traktis sammaniere.

— Jen ses kopekoj . . .

* * *

En la oficejo oni eldonas pasportojn por la vojaĝo al Varsovio. Iu kozaka estro skribas ilin sur tablo en la ĉambro; en alia ĉambro atendas la klientoj, plejparte judaj komercistoj. Juna kozako, proksimume dudek-kelkjara, herculesa kaj tre energia, starigas ilin laŭvice, grupigas kaj ordigas por la prezentado ĉe la komandanto. Li alparolas simple, ĉiun en la sama maniero:

— Donu monon!

Ŝutiĝas moneroj po dek kvin, dudek kopekoj, iafoje argenta rublo. La kozako taksas laŭ la vestaĵo kaj aspekto, rimarkigante plejofte, ke „tio estas malmulta!“

— Kiu volas veturi, devas pagi! Li volas fari negocon, sed al nia frato li ne permesas profiti?

La kontribucion oni aranĝas la duan fojon, denove sonoras malgrandaj kaj pli grandaj moneroj. Fine la impostado estas finita, la pordo de la komandanta ĉambro devas malfermiĝi. Sed tiam sekvas surpriza *coup de théâtre*. La pordo efektive malfermiĝas, sed de alia ĉambro, dekstre. La herculesa kozako ekkaptas la plej proksime starantajn kaj puŝas ilin en tiun ĉi direkton, dek-kelkaj komercistoj falas en la brakojn de tie jam atendantaj kozakoj.

— Ha, vi friponoj! Atendu iom!

La vipoj estas levataj, oni aŭdas frapadon kaj kriadon, mallautigitan per la brufermata pordo. La kozako ĉirkaŭrigardas inter la restintaj kaj ripetas afable:

— Monon, donu monon!

La okulvidebla ekzemplo havis rezulton. La kozako kolektas ankoraŭ pli grandan rikolton. Sed ĉe la komandanto alvenas nur tiuj, kiuj al li plaĉas. La aliaj elkuras sur la korteton, gajaj pri tio, ke oni ilin ne direktigis al tiu pordo, kie oni kvitanças la kontribucion per vipofrapoj sur la dorson.

* * *

Ni elveturas el la urbeto. Mirakle mi akiris veturilon. Unu ĉevalo, grizulo, al kiu oni povas denombri ĉiujn ripojn, tiras kun resignacio la korbveturilon, en kiu mi enlokiĝis kun mia kofro. Nur dank' al sep rubloj, kiujn mi pagis antaŭe, mi sukcesis instigi la veturigiston, junan judon, forlasi la stalon. Li havas pasporton, mi ĝin ankaŭ havas; dum la vojaĝo kelkaj kozakaj patroloj revizias la paperojn, sed ni traveturas sanaj kaj netuŝataj. Ni jam vidas la unuajn kabanojn de la vilaĝo, en kiu finiĝas la devoj de mia veturigisto. Subite ni aŭdas el la arbeto la ekkrion:

— Haltu!

Ni haltas momente, preskaŭ samloke. Oni vidas kelkajn lancojn. La komandanto de la patrolo alrajdas la veturilon.

— Pasportojn?

Ni transdonas ilin.

— Vi estas polo?

— Jes.

— Li estas judo?

— Jes.

La estro alparolas min.

— Forlasu la veturilon, vi iros piede.

Mi provas klarigi al li, ke mi pagis la veturilon kaj ke mi estas devigata porti mian kofron; mi petas, ke li permesu veturi ĝis la vilaĝo.

— Vi iros piede — li respondas kun akra akcento.

La esprimo estas tiel decida, ke mi eliras la veturilon kaj prenas la kofron per mano.

— For! Marŝu for! — instigas min la kozako.
— Vi tie ĉi ne havas iun aferon.

Mi foriris dek-kelkajn paŝojn. Malantaŭ mi ekkrakis du sekaj pafoj el revolvero. Mi turniĝis, sur la strato kuŝis la veturigisto proksime de la ĉevalo. La patrolo rajdis for.

R. Maske

El la vivo kaj sciencoj

Saban-tuj

Saban-tuj estas nacia popola festo de baŝkiraj, tataraj kaj aliaj mahometanaj vilaĝoj; ĝi signifas *edziĝfesto de plugilo* aŭ — de la plugsezono. Jen priskribo de la festo, okazanta en Aprilo:

Tuj post kiam supreniris la suno, en la vilaĝo komenciĝas vigla movado. La strato estas plena je buboj, kiuj ludas, ridas, saltas, kuradas. Ili vekigis samtempe kun la suno, kaj nenion manĝinte, ili kunkuris en la strato kun la gaja ekkrio „hodiaŭ estos *saban-tuj!*“ Ankoraŭ ne pasis horo, kiam la strato pleniĝas je ĉevaloj kun bravaj rajdantoj sur ili. La ĉevaloj estas bone brositaj, la vosto kaj kolhararoj estas ornamitaj per floroj. Kioma amaso da ĉevaloj! Malgrasaj kun longa vila hararo, ĉevalidoj kun kruroj maldikaj kiel fadeno, kaj gravedaj ĉevalinoj dikaj kiel barelo. Tamen estas pli da bonaj vilaĝaj ĉevaloj, grasigitaj por la baldaŭa laboro sur kampo, drolotitaj, harditaj kaj ankoraŭ ne perdintaj la junecon. Bravaj knaboj rajdadas kaj kolektas tukojn, viŝtukojn-premiojn por gajnontaj homoj kaj ĉevaloj. Ili haltas ĉe ĉiu domo kaj, ne malsuprenirante, prenas el fenestroj tukojn, alligante ĉi tiujn al la zono. La infanaro ne postrestas; ĝi kuradas ĉien kaj faras tumulton en la strato. Samtempe ĉe la fino de l'vilaĝo vendistoj de kukoj kaj aliaj frandaĵoj konstruas budojn. Ĉirkaŭ la 11a horo la tuta stratvivo transiras al la kampo, kiu baldaŭ nigriĝas pro la amaso da popolo. Antaŭ la oficiala malfermo de *saban-tuj* junaj knaboj-tukokolektintoj kaj buboj aranĝas provan vetkuradon je distanco de ne pli ol unu versto. La oficiala festo komenciĝas post la 12a. Ĉiuj rapidas al la kampo, viroj sur unu flanko de la strato kaj virinoj sur la alia. Tiuj lastaj — en multkoloraj vestoj — amasiĝas sur apuda izolita monteto, kiun supreniri viroj ne rajtas; nur la knabinoj kuras inter viroj. Ekkuras la unua parto de ĉevaloj al la fiksita distanco, sed tiu ĉi ne estas la ĉefa; pasas ankoraŭ horo, kaj nur tiam venas la tempo por la ĉefa vetkurado. Ĉiujn moskeojn plenigas aro da honoraj vilaĝanedzinoj, filinoj kaj riĉulinoj. La printempa suno hele brilas kaj re-

speguliĝas sur la kapvestaĵoj, ĉapoj, ornamitaj kaj borderitaj per pozamentoj, sur blankaj, ruĝaj, flavaj kaj verdaj ŝtofoj, en kiuj estas envolvitaj la virinoj. Ankoraŭ momento — kaj ekaŭdiĝas la krio „oni rajdas!“ Ĉiu rapidas al la kurvojo, por vidi la antaŭan rajdanton; inter la popolo, kiel fulmo, rapidrajas la premioto. Poste sekvas homkurado. Iom poste rekomenciĝas vetrajado kaj fine okazas luktado; en tiu tempo la virinoj reiras hejmen. Kutime komencas infanoj, kiujn sekvas plenaĝuloj. En la centro de rondo sidas la bravuloj pretaj por batalo. Inter la rigardantoj vagas administrantoj kun bastono en la mano. Ili invitas al la batalkampoj kaj iufoje eĉ perforte devigas lukti. Ĉar por luktado elpaŝas reprezentantoj de diversaj vilaĝoj, ofte tiu lukto venas al vera batalo-veto; se okazas venko de iu vilaĝo, tiam eĉ ofenditaj maljunuloj komencas lukti kun junuloj pro rehonorigo de sia vilaĝo. Kvankam ofte aŭdiĝas granda bruo kaj akraj disputoj, tamen ĉiam mankas sanga malpaco; sufiĉas, se intermiksiĝas iu honorata maljunulo aŭ luktaŭtoritato, kaj baldaŭ la batalantoj repaciĝas. Malgraŭ amaso da popolo la festo ĉiam finiĝas sen helpo de polico. La tataroj amas sian *saban-tuj'on* kaj tre ŝatas, ke ĝi ne perdu sian gravan signifon.

(N. Foss, Ufa)

Kiel anseroj inklinas al muziko

Tra silezia vilaĝo moviĝis malrapide funebra procesio; jen ludis muzikistaro, jen kantis la kunirantoj. Subite el flanko strateto aperis ansero, kiu kuris rapide antaŭen kaj akompanis la procesion, ĉiam irante apud la muzikistaro. Kelkaj personoj penadis, forpeli la obstinan birdon. Nenio helpis. Baldaŭ la procesio atingis la tombejon. Fine kuraĝa persono prenis la anseron je la kapo kaj portis la muzikamantan beston malantaŭen, ĝis ĝi ne plu povis aŭdi la funebrajn marŝojn kaj kantojn — kaj nun — la ansero trankvile marŝis hejmen.

La instruisto de la sama vilaĝo posedis anseraron. Regule merkrede kaj sabate okazis kantinstruado. Ĉiufoje kiam la viransero aŭdis la unuajn tonojn, ĝi tuj forlasis siajn kunulojn, iris al la pordo de la lerneja ĉambro, kaj stariĝante tie, ĝi movis sian kapon jen supren jen malsupren antaŭ la pordo kaj ŝajnis treege kontenta pri la kantado de la lernantoj — kaj tion ĝi daŭrigis ĝis la fino de sia vivo.

La forĝisto, kiu loĝis proksime de preĝeja turo, ankaŭ estis posedanto de multaj anseroj. La nokton ili pasigis en stalo, en kiu ili povis aŭdi la sonon de la turhorloĝo. Ĉiun sonon de la horloĝo la anseroj ĉiuhore akompanis per akra ekkrio. Kaj se la forĝisto ne aŭdis la horloĝon, la anseroj anoncis al li la horon por ĝustatempa ellitiĝo.

P. T., Berlin

Liftoj en New York

En la urbo New York ĉiutage funkciadas 11 350 liftoj por pasaĝeroj kaj 6500 liftoj por pakajoj kaj komercaĵoj. Jen kelkaj ciferoj pri ili:

Meza alteco de konstruaĵoj, en kiuj estas liftoj: 8 etaĝoj.

Meza alteco de ĉiu etaĝo: 3.36 metroj.

Meza ĉiutaga funkciado de la liftoj: 75 fojoj.

Distanco ĉiutaga de ĉiu lifto: 2376.66 metroj.

Tuta distanco de ĉiuj liftoj: 42062 kilometroj.

Tuta nombro ĉiutaga de pasaĝeroj: 6 683 750.

J. L. St.

El kaj pri la milito

El Esperantujo

Nia samideanino Wally Cuno sendis el Königsberg i. P. malĝojigajn sciigojn pri la teruraĵoj, kiuj okazis en Orienta Prusujo. La mizero estas granda. En la lazaretoj ja ĉio estas bone prizorgita, tamen mankas ankoraŭ multe da objektoj. Oni ankaŭ tie treege bezonas cigarojn. La soldatoj dum doloriga operacio ne ellasas la cigaron el la buŝo. Ĉe unu soldato la kuracisto ordonis, ke oni distranĉu la ŝtrumpon, por ke la piedo estu bandaĝota. La vundito petis la flegistinon, ke oni ne difektu la ŝtrumpon, car li ne havas alian paron. Kaŝe, malantaŭ la dorso de la kuracisto, oni plenumis la deziron.

Ĉi tiuj sciigoj instigis la Dresdenajn esperantistojn, sendi pakon da ŝtrumpoj kaj cigaroj al Königsberg, aldonante ĉokoladon, naztukojn, libretojn ktp.)*

* * *

Post la eksplodo de la milito nia samideano Süssermann (Buchhandlung Flössel, Dresden) estis devigata forigi la anoncojn: *Ici on parle français*, *English spoken* de sur sia montra fenestro. La homoj envenis de la strato por tion postuli, unu post la alia, ne estis helpo, per ŝmirsapo la anoncoj devis esti forviŝataj. La anonco: *Oni parolas Esperante* kompreneble restis, fiere ĝi nun paradas sola sur la montra fenestro.

M. H.

Opinioj en Norvegujo

Nia samideanino F-ino Geinitz, kiu havas multajn amikojn en Norvegujo, ricevis la jenajn leterojn el Kristiania:

Ni norvegoj estas tre ĉagrenitaj, ke oni skribis en la germana gazetaro malbonajn kul-pigojn kontraŭ ni. Oni skribis, ke ni norvegoj

*) Vidu la respondan leteron de F-ino Cuno sub „Kriegsbriefe“ en eldono A.

La red.

estas malamikoj de Germanujo, kvankam ni estas neŭtralaj, la norvega gazetaro estas subaĉetita, ni ne subtenis senhelpajn germanojn ktp.)* Sciuj, tio ĉagrenas! Kaj tio estas tiel malprava! Tie ĉi ne estas malamikeco, sed granda simpatio por la germana popolo, kiu tiom amas sian patrujon kaj kiu estas tiom sana, kuraĝa, brava, oferema, grandanima kaj malegoista!

Ni havas ĉi tie en Kristiania nacian, jubilean ekspozicion. En Junio kaj Julio ni havis tie bonegan germanan muzikistaron, multe ŝatatan de ni ĉiuj. Ni staris kaj promenis tie milope por aŭskulti. Kie nun estas la anoj? Kun kia malĝojo ni adiaŭis ilin! Kiel volonte ni ĉiam vidis germanojn en nia lando kaj kiom ni ankaŭ ŝatas la imperiestron! Neniam norvego forgesos la bonan koron, kiun la imperiestro al ni montris ĉe la brulado en Aalesund. De li la unua helpa ŝipo alvenis al la malfeliĉaj senhejmuloj, kiuj ĉion estis perdintaj! Kaj *tia rapida* helpo — tiel mirinde rapida — kiel nur la plej bona patra koro ĝin povas elpensi!

* * *

Kristiania (Akersbakken), 2. 10. 14

Kara fraŭlino Geinitz,

Dankon por letero de la 5a, kiun mi ricevis la 10an. Pri nia kongresvojaĝo mi skribis en nia gazeto, kiun mi sendos al vi. Estas tre interese, legi en la eksterlandaj gazetoj la vojaĝrakontojn, ĉiuj spertis la samon. Nian Majstron kaj edzinon ni renkontis en Köln, de kie ili vojaĝis hejmen la 1an matene. En la „Ondo de Esperanto“ mi legis, ke ili havis teruran hejmveturadon, 15 tagojn. Ŝajnas al mi nekredible. *Via libro pri la milito estas tradukita norvegen kaj aperas en niaj gazetoj.**)* Hodiaŭ mi legis bonan artikolon de pastro Ernst Modersolm en Blankenburg. Nun ni uzas Esperanton pli ol iam kaj mi kredas, ke post la milito oni preferos neŭtralan lingvon. F-ino Heimbeek fariĝis fervora. La abstinenta traktato estas bonega. Mi timas, ke ni perdos multajn samideanojn dum tiu ĉi terura milito. Ni ricevis leteron el Leipzig, trovi viron en Riga; mi esperas, ke ni sukcesos. Mi kredas, ke pere de Esperanto ni nun povas helpi multajn.

Ni ne ricevis „Germana Esperantisto“, eble ĝi ne eliras.

Kun koraj salutoj al vi kaj de gesamideanoj de nia grupo al la via

Josefine Finholt

*) Ĉu oni efektive skribis tion en germanaj gazetoj? Estas preskaŭ nekredible.

La red.

**) Estas la broŝuro „La vero pri la milito“, oficiala dokumentaro esperantigita el germana lingvo. (Vidu la bibliografian parton.)

La red.

Nekrologio

Riĉan rikolton la kruela morto faris dum la lasta tempo en Esperantujo kaj ĉirkaŭaĵo. La memoro pri tiuj germanaj samideanoj, kiuj falis kiel herooj sur la militkampoj, estas honorata en eldono A; ĉi-sube ni honore mencios mondlingvanojn, kiujn la morto alimaniere forrabis el la tera vivo.

Gravan perdon suferis niaj samideanoj en Wien per la morto de

Dro J. Werber

kiun ili la ¹⁹¹⁴ 17an de Junio akompanis al la lasta ripozejo. Dro Werber estis unu el la plej laboremaj pioniroj de la Esperanto-movado en Aŭstrio. Li estis prezidanto de la tiea Ligo de Germanlingvaj Esperantistoj, honora membro de la Unua Esperanto-Unuiĝo en Wien kaj grandanima administranto kaj protektanto de nia kunfrato German-Aŭstria Esperantisto.

De post sia esperantistiĝo, en la jaro 1907, Dro Werber energie kaj sindoneme laboris por nia afero, kaj per lia kunhelpo la Esperanto-movado en Aŭstrio bone progresis. Li kunorganizis en la jaro 1910 la 1an Tutaŭstrian Esperanto-tagon en Wien, kaj en 1912 li eniris la Konstantan Komitaton de la Kongresoj.

La plej grandajn meritojn la mortinto havis pri German-Aŭstria Esperantisto, kies ekzistadon li helpis per grandaj mondonacoj. La funebro kaj doloro, kiujn la aŭstria samideanoj sentas pri la perdo de la kara mortinto, kortuŝe esprimis profesoro Glück ĉe la ĉerko antaŭ la enterigo. Dro Werber mortis la 15an de Junio sekve de antaŭa apopleksio; unu el liaj lastaj deziroj estis, ke lia filo fariĝu bona esperantisto.

Al multaj vizitintoj de niaj internaciaj kongresoj la mortinto, estas konata kiel afabla, bonkora homo kaj kiel vigla pioniro de Esperanto; certe ili funebras same kiel ni pri la foriro de tia fervora samideano en la eternan vivon!

*

Laŭ sciigo, kiun ni ricevis el Danujo, la polaj samideanoj en Galicio perdis tre ŝatatan kunlaboranton en la universitata profesoro

Dro Odo Bujwid

mortinta sekve de aŭtomobila akcidento. Dro Bujwid, fama bakteriologo, al kiu la scienco dankas gravajn malkovrojn, estas konata al la esperantistaro kiel meritplena prezidinto de la Loka Organiza Komitato de la jubilea Kongreso de Esperanto en Kraków. La partoprenintoj de tiu kongreso certe ankoraŭ memoros la tre simpatian viron, kiu helpis aranĝi la grandiozan, brilan feston. Krome li estis la prezidanto de Societo Esperanto en Kraków, kaj ankoraŭ en Junio nunjara li prezidis la 2an kongreson de polaj esperantistoj en Bochnia. En sia urbo li estis influriĉa persono, kiu, estante tre fervora esperantisto, multe helpis tie al la progreso de nia afero.

*

Ankaŭ el la ĉirkaŭaĵo de Esperantujo ni povas sciigi la morton de grava persono. Laŭ komunikoj el Danujo, de U. E. A. kaj laŭ anonco en la Parisa ĵurnalo *Le Temps* mortis en komenco de Aŭgusto, ankaŭ sekve de aŭtomobila akcidento, la matematika profesoro

Dro Louis Couturat

plej konata kiel sekretario de la Akademio de Unio por la Lingvo Internacia (Ido). Li estis kapablega kiel lingvisto same kiel verkisto kaj organizatoro; la franclingva libro „Histoire de la Langue Universelle“, kiun li ellaboris kune kun Dro Leau, estas fame konata. Unue li estis fervora esperantisto, kaj kiel tia li estis elektata sekretario de la tiama Delegitaro por enkonduko de internacia helplingvo. Estas sufiĉe konate, kiamaniere li poste agis en tiu pozicio kaj kiel li fariĝis la spirita direktanto de la Ida afero. Do ni povas silenti pri lia posta agado, obeante la latinan proverbon: „Pri la mortintoj diru bonon aŭ nenion“. Li estis batalema homo; la morto venkis lin, kaj li nun ripozu en paco!

Germ. Esp.

≡ Tra Esperantujo ≡

IIa Kongreso de polaj esperantistoj

Proksime de la antaŭdujara kongresejo, proksime de Kraków, en Bochnia (elp. Bohnja), okazis la dua Kongreso de polaj esperantistoj en la tagoj de 1' 28a kaj 29a de Junio 1914. Subvenciita de la urbestro kaj du urbaj kasoĵ entute per 200 K., ĝi faris grandan propagandon, ekinteresis la plej eminentajn personojn de la urbo kaj distrikto kaj antaŭenpuŝis nian movadon sur novajn vojojn. Kiel protektoroj de la kongreso deklaris sin S-roj Dro F. Maiss, urbestro kaj deputato de la landa parlamento, J. Veltzé, konsilantarano de i. k. r. Landestraro kaj distriktestro, A. Hanusz, marŝalo de la Bochnia'a distrikto kaj A. Ruebenbauer, deputato de la ŝtata parlamento.

La kongreson malfermis la prezidinto de la Ia Kongreso, okazinta en 1911 en Lwów, Dro A. Godlowski el Lisko; poste salutis la kongreson en nomo de la urbo kaj distrikto deputato A. Ruebenbauer kaj konsilantarano de i. k. r. Landestraro J. Veltzé. Sekvis salutparoladoj de reprezentantoj de diversaj societoj kaj grupoj; tiel salutis la kongreson S-roj Dro A. Kleski (Jablonow), B. Kuhl (Wien), A. Juŝelowski (Wilna), Dro S. Mikolaĵski (Lwów) k. a. Sed plej grandan aplaŭdon kaŭzis parolado de salmineja laboristo S-ro J. Zarychta el Bochnia, kiu alvokis al pli granda propagando de la lingvo inter laboristoj.

Post salutaj paroladoj sekvis elekto de Prof-ro O. Bujwid (Kraków), kiel prezidanto, Dro S. Mikolaĵski (Lwów), Ia vicprezidanto kaj Prof-ro Z. Wilusz (Bochnia), IIa vicprezidanto kaj S-roj B. Kuhl (Wien) kaj L. Kronenberg (Bochnia), sekretarioj. Oni tralegis salutajn telegramojn de Dro L. L. Zamenhof, de hungarlanda kaj aŭstria internacia kongreso esperantista en Pozsony (Hungarujo), de la Redakcio de „Pola Esperantisto“, de Pola Esperantista Societo en Warszawa (Polujo), de Unua Esperanto-Unuiĝo (Wien), de Pola Esperanto Societo (Posen) k. a. Post parolado de Prof-ro Bujwid kaj Dro Mikolaĵski sekvis referato de S-ro S. Rudnicki (Kraków) pri „Ligo de polaj esperantistoj en Aŭstrio“, en kiu li akcentis la neceson de ĝia kreo, sekvante la ekzemplon de aliaj nacioj,

kaj mallonge skizis la projekton de regularo. La diskuto estis prokrastata ĝis la venonta tago.

Dum komuna tagmanĝo la prezidanto de la Loka Komitato, Prof-ro Z. Wilusz, tostis je la sano de la partoprenantoj kaj dankis pro ilia multnombra alveno. Responde dankis Dro S. Mikolajski al la Loka Komitato en Bochnia kaj Organiza Komitato en Kraków pro bona aranĝo de la kongreso.

Posttagmeze okazis ekskurso al Okocim, kie la kongresanoj vizitis tiean faman bierfarejon kaj belegan parkon. Reveninte al Bochnia, la ĉeestantoj eksciis pri la mortigo de la aŭstria ĉefduko, kio kaŭzis revokon de la balo.

La duan tagon okazis daŭrigo de la kunsido, dum kiu la prezidanto sciigis la ĉeestantaron pri la tragedia morto de la ĉefduko kaj proponis fermi la kongreson, akceptante nur proponon de Dro Mikolajski, ke la IIa Kongreso de polaj esperantistoj akceptu prezentitan projekton de regularo de la „Ligo de polaj esperantistoj en Aŭstrio“ kaj komisiu efektiviĝon de tiu ĉi projekto al la estraro de „Societo Esperanto“ en Kraków, rajtigante ĝin funkcii ĝis venonta kongreso kiel provizora estraro de la ligo.

La kongreson partoprenis pli ol 60 personoj el 26 urboj.

K. Alfus (Kraków)

Varietea Esperantista Ligo

Bericht über die Jahresversammlung im Kristallpalast zu Leipzig, am 29. Mai 1914

Herr Camillo Schwarz als Vorsitzender eröffnet die Sitzung um 5 Uhr, stellt deren Beschlußfähigkeit fest und erteilt dem 2. Vorsitzenden, Herrn Carl Schwarz, das Wort zum 1. Punkt der Tagesordnung:

Jahres- und Kassenbericht. Hierzu führt Herr Carl Schwarz folgendes aus: Die Liga zählt 251 Mitglieder, die sich aus Direktoren, Regisseuren, Agenten, Artisten und Kapellmeistern zusammensetzen. 11 Nationalitäten sind durch Mitglieder der Liga vertreten. Die Tatsache, daß seit geraumer Zeit die Liga wenig von sich hören ließ, hing mit einer Reihe der verschiedensten Umstände zusammen. Der bisherige Leiter unserer Geschäftsstelle, Herr Dr. Linse, wurde in seiner politischen Laufbahn zum Generalsekretär der nationalliberalen Partei des Wahlkreises Hessen-Darmstadt befördert, siedelte nach Mainz über und ist ständig derart in Anspruch genommen, daß er seine Tätigkeit für die Liga einstellen mußte. Durch übergroße berufliche Inanspruchnahme wurde auch der Vorstand an einer regen Betätigung zugunsten der Liga verhindert. Trotz dieser Hindernisse wurden die Ligaziele verfolgt, und mit Freude könne festgestellt werden, daß die Bedeutung des Esperanto in Berufskreisen schon fast allgemein gewürdigt wird und daß die Anhängerschaft ständig wächst. Die V. E. L. dürfte ein gutes Teil des Verdienstes an dieser Verbreitung des esperantistischen Gedankens am Variété für sich in Anspruch nehmen. Der Betätigung ihrer Mitglieder sei ein sich immer mehr ausbreitendes Interesse für den leitenden Gedanken der Liga zu verdanken. So sei auch die Veröffentlichung eines neuen Lehrganges in den Spalten des direktorialen Fachblattes, ferner in den artistischen Fachblättern „Der Künstler“ und „Illustrierte Zeitschrift für Variété, Theater und Zirkus“ zu begrüßen. Die Zahl der durch die Liga, im Einverständnis mit den betreffenden Direktoren veran-

stalteten Propaganda-Abende, beträgt 12. Der Umstand, daß im Mellini-Theater in Hannover innerhalb eines Monats 2 Esperantovorstellungen stattfinden konnten, gälte als Beweis für den Erfolg solcher Veranstaltungen. Der letzte derartige Esperanto-Abend fand im Flora-Theater A. G. in Altona am 27. April d. J. statt. Wiederum war das Programm in Esperanto gedruckt und in gleicher Sprache waren Anzeigen als Vorreklame erschienen. Fast ausnahmslos brachten die auftretenden Künstler Esperanto-Einlagen, und das Stück der Herren Schwarz „la disrompita spegulo“ wurde hauptsächlich in Esperanto aufgeführt. Der Vorsitzende Herr Senff überreichte namens des Ortsverbandes Hamburg-Altonaer Esperantogruppen einen Lorbeerkranz mit einer Ansprache, die kurz das Wesen und die Ziele des Esperanto und der V. E. L. insbesondere darlegte. Herr Carl Schwarz drückte den Dank namens der V. E. L. in einer esperantistischen Anrede aus und schloß mit einem Hoch auf das Esperanto und die zahlreich anwesenden Hamburg-Altonaer Esperantisten, in das das Publikum begeistert einstimmte. Die Esperanto-Programme dieser und aller vorhergehenden Vorstellungen stehen auf Wunsch und solange der Vorrat reicht Interessenten zur Verfügung. Auf der ersten Variété-Ausstellung in Berlin war die Liga durch einen eigenen Stand vertreten; es gelangten dort Esperanto-Statistiken, V. E. L.-Programme und Literatur, eine Zusammenstellung der existierenden Esperantozeitungen usw. zur Ausstellung. — Die vorgelegten und bereits von Mitgliedern revidierten Kassenbücher ergeben einen Ueberschuß von M. 100.—. Zum Punkt

Wahl des neuen Vorstandes übermittelt der Vorstand die Bitte des Herrn Dr. Linse, von seiner Wiederwahl abzusehen, da er leider keine Zeit zur Führung der Liga-Geschäfte finden könne. Diese Mitteilung wird mit Bedauern zur Kenntnis genommen, und die Verdienste des Herrn Dr. Linse um die Organisation der Liga werden entsprechend gewürdigt. Es werden hierauf Herr Camillo Schwarz als Vorsitzender und Herr Carl Schwarz als Geschäftsführer und stellvertretender Vorsitzender wiedergewählt.

Satzungsänderungen. Antrag Carl Schwarz, die jährlichen Beiträge in einmaliges Eintrittsgeld abzuändern. Durch Beispiele aus der Praxis wird der Antrag begründet und besonders auf den Umstand verwiesen, daß die Mitglieder der Liga meist keine ständige Adresse haben, heute hier und morgen dort sind, und deshalb nur schwer erreicht werden können. Es wird ferner geltend gemacht, daß keine Gehälter, sondern nur die Auslagen für Porto, Bürobedarf und Propaganda gezahlt werden. Herr Franz Lange erweiterte diesen Antrag dahingehend, daß alle bisher gezahlten Beiträge als Eintrittsgelder angesehen werden sollen, so daß weitere Zahlungen der alten Mitglieder unnötig sind; Zuwendungen können dem freien Ermessen der Mitglieder überlassen werden. Die Abstimmung ergibt einstimmige Annahme des erweiterten Antrages, so daß nunmehr aktive Mitglieder M 5.— als Eintrittsgeld zu entrichten haben. Es wird ferner beschlossen, die Satzungen entsprechend abzuändern. *Die Adresse der Geschäftsstelle lautet nunmehr Düsseldorf-Grafenberg, Gutenbergstraße 1, Telefon 14316.* Alle Mitglieder und Esperantisten finden dortselbst eine kleine Esperanto-Ausstellung; jeder Besucher ist herzlich willkommen.

Jubileoj

La *bankejo Gebr. Arnhold en Dresden*, ĉie konata en Esperantujo, la 10an de Oktobro povis festi la 50-jaran ekzistadon de sia firmo. Unu el ĝiaj kunposedantoj estas la lerta „financministro“ de Germana Esperanto-Asocio, Dro *Heinrich Arnhold*. El modesta komenco la entrepreno evoluis ĝis sia nuna grandeco kaj graveco tiel, ke ĝi hodiaŭ estas la plej granda kaj plej ŝatata privatbanko en Saksujo. Okaze de la jubileo la firmo inaŭguris sian denove plivastigitan ĉefoficejon, kiu estis belege ornamita per multego da floranĝaĵoj donacitaj de grandnombra gratulantaro. Pro la jubileo la firmo donacis sumon de 50000 M por bonfaraj celoj.

Ni kore gratulas la bankon pro ĝia grava, ĝojiga festo, kiu bedaŭrinde falis en tre seriozan tempon. La firmo plue prosperu kaj floru kaj — ne perdu sian intereson pri la Esperanta afero, kiun ĝi jam ofte montris evidente kaj malavare!

Okaze de la jubileo la firmo donis ankaŭ la prokuron al S-ro *K. von Frenckell*, la ŝatata afergvidanta prezidanto de G. E. A. Ankaŭ al li koran gratulon!

Tre ĝojigan kaj ankaŭ sufiĉe gravan jubileon povis festi S-ro *K. Wallon*, nuntempe en *Dresden*: la 30an de Septembro estis pasintaj 25 jaroj de post tiu tago, en kiu li komencis sin okupi pri Esperanto. S-ro Wallon estas unu el la plej malnovaj esperantistoj. Li jam laboris kune kun Trompeter kaj Einstein por la disvastigo de Esperanto, kaj kiel unu el la plej fervoraj pioniroj li fondis la duan Esperanto-grupon en Germanujo, nome tiun en Braunschweig. Nelacigebla li estis en la propagando por la ideo de tutmonda helplingvo; precipe li propagandis en komercistaj kaj stenografistaj rondoj. Ankoraŭ nun S-ro Wallon estas vigla kunlaboranto en la Esperanta afero, kaj ĉiam li estas preta agi, se oni bezonas lian ŝatatan helpon aŭ lian spertan konsilon.

La germana esperantistaro certe konsentos, ke ni en ĝia nomo esprimu al nia kara samideano tre koran gratulon kaj la plej bonajn dezirojn por la estonteco; en bona sanstato kaj en kontentiga pozicio li unue ĝisvivu sian 50-jaran jubileon esperantistan, kaj poste — ni vidos plue!

Germ. Esp.

Esperantaj gazetoj dum la milito

Krom nia gazeto aperis, laŭ ricevitaj sciigoj, dum la milito la jenaj: *British Esperantist*, *Ondo de Esperanto*, *La Espero* (Svedujo). La laste diritan gazeton ni ricevis ĝis nun regule, sed de la aliaj ni ne vidis la dumilitajn numerojn. Ni estus dankaj, se oni sciigus al ni, ĉu ankaŭ la unuaj du gazetoj regule aperas, kaj ĉu ankoraŭ aliaj eliras dum la milito. *German-Aŭstria Esperantisto* sciigis al ni, ke ĝi aperos ankoraŭ dufoje en la nuna jaro. Estas tre bedaŭrinde, sed pro la milito ne aliĝebla, ke la esperantistoj de la diversaj landoj dum la nuna tempo ne povas interrilati almenaŭ per siaj gazetoj. Ĉu oni ne povas aranĝi intersanĝon tra neŭtralaj landoj? Volonte ni akceptus tiurilatajn proponojn.

Ĉekbanko

Oni sciigis al ni, ke la Ĉekbanko Esperantista bone kaj akurate funkcias por la neŭtralaj landoj. Ni ĝojas pri tio kaj esperas, ke ankaŭ la bonhavo de la kontuloj el militantaj landoj ne estas en danĝero.

≡ Grafologia fako ≡

Kondiĉoj por la uzo de nia grafologia fako

1. Kun ĉiu demando oni sendu 2—3 skribaĵojn de minimume po 10—15 linioj, skribitajn, ne speciale por tiu celo, per inko sur papero sen linioj. Nepre rekomendinde estas, ke la skribaĵoj devonu el diversaj tempoj dum la lastaj monatoj.

2. Oni diru la *seksan* kaj la *aĝon* de la skribinto. La grafologo ofte ne povas ekkoni la seksan el la skribaĵoj; tamen tiu ĉi scio estas grava por la prijuĝo de karakteraj ecoj.

3. Oni diru, laŭ kiu direkto specialaj esploroj estas diziritaj, ekzemple pri diligento, devokonscio, akiremo, veramo, natureco, scivolemo, idealismo, realismo, konstanteco, pasioj ktp.

4. Por la prijuĝo de la manskribo de *unu persono* oni sendu 1/2 Sm., aŭ per transpagilo, aŭ en 5 respondkuponoj stampitaj, aŭ per *germanaj* poŝtmarkoj. Krom tio oni aldonu 1 respondkuponon por afranko de la respondo.

5. La alsendoj estas adresotaj al nia redaktoro en Berlin; sed oni ne forgesu sufiĉe klare montri sian adreson!

Elsa kaj „li“ — Vi estas modesta kaj trankvila naturo, kiu en la ĉiutaga vivo estas malmulte postulema. Bedaŭrinde kuniĝas kun tiu modesteco ankaŭ timemo tiel, ke via konduto vere ne estas tro aplomba. Vi forte inklinas al boneco, molanimeco kaj cedemo, kaj vi lasas vin ankaŭ influi kaj facile gvidi.

Via kapablo pri kritiko estas forte esprimita — feliĉe vi kritikis vin mem pli ol vian ĉirkaŭantaron. Preskaŭ oni povas diri, ke tiu memkritikemo estas iom tro forta ĉe vi. Tio ankaŭ kaŭzas, ke vi volonte komparas inter aliaj personoj kaj vi, kaj ke vi bedaŭrinde faras la eraron, tro akcenti vian propran malfortecon. Tre versaĵne mi ne eraras, supozante, ke el tiu tro forta akcentado de via malforteeco rezultas granda parto de la jam diritaj timemo kaj malkuraĝeco. Tial, ĉar vi vidas la supozitajn superecojn de aliaj personoj en tro akra lumo, sed viajn proprajn bonajn ecojn tro multe metas en ombbron kaj des pli akcentas vian propran malfortecon, vi ofte estas malkontenta, malbonhumora kaj kaprica. Se vi profunde pripensus tiun ĉi cirkonstancon, vi facile trovus, ke ankaŭ via necerteco kaj malkuraĝo devenas el la sama, tro forte esprimita memkritiko. Nu, ĵusta memkritiko certe estas unu el la plej belaj virtoj, kiujn homo povas proprigi al si —, sed en troigita formo ĝi nepre kondukas al fremdiĝo kaj soliĝo. Pro tio, fraŭlino Elsa: estu kuraĝa kaj senĝene rigardu en la ridantan vivon!

Kaj nun venas la dua parto, nome „li“, la tridekjara sinjoro!

Hm, — mi efektive ne scias, kie komenci ĉe tiu tre multflanka homo, ĉar li, krom siaj bonaj ecoj, havas ankaŭ tiel forte esprimitajn malagrablajn flankojn. Nu, mi ne volas anticipi. Do — aŭskultu, fraŭlino Elsa:

La plej bela virto de li estas lia vere elstaranta estetika sento. Li povus esti fariĝinta artisto. Sed, se li havus nur iomete de la kapablo pri memkritiko, kiun vi havas tro multe, estus pli bone por li. Tiu-okaze li baldaŭ ekkonus, kiel malbele lia forta ekkolero kaj kelkatempe ankaŭ lia preskaŭ timiga sovaĝeco efikas al la ĉirkaŭantaro. Baldaŭ li ekkonus, ke tiuj ecoj estas liaj plej malbonaj kaj plej grandaj malamikoj, kaj certe li tuj kontraŭbatalus ilin. Sed mi pensas, ke vi, laŭ viaj demandoj pri konstanteco, veramo ktp., volas aŭdi ion alian ol la diritan. Do ni transiru al tiuj ĉi ecoj. Bedaŭrinde la veramo ne

estas klare konstatebla el la skribo. Cetere tio estas granda feliĉo, ĉar — pripensu — ĝi povus havi netaŭvideblajn sekvojn! La stato de la konstanteco — mi komprenas sub ĝi fidelecon — estas „sufiĉe“ bona; certe pli bona ol la mezo.

En la skribo frapante sin esprimas karakteriza kaŝemo; sed ĝi rilatas nur al certaj, el la preparolataj linioj ne klare konstateblaj aferoj. Plue sin montras tipa nereguleco en la horizontaleco de la skriblinioj, kiuj ne estas rektaj. Tio konkludigas je kaprica karaktero, ĉar mankas la konstanteco. Fraŭlino Elsa, mi ne estas pesimisto, sed mi kredas, ke „li“ kaj vi tro forte kontrastas unu la alian. Verŝajne vi ambaŭ niam ĝisreste vin komprenos reciproke — se „li“ ne defunde ŝanĝiĝas. Ĉar li estas energia kaj portas en la interno de sia koro kiel bonegan kernon bonecon kaj amon, li certe tion atingos per serioza volo kaj severa memdisciplino.

Al liaj bonaj ecoj apartenas facila komprenkapablo, parollerteco kaj respondpreteco. Li ankaŭ facile entuziasmiĝas, kaj facile flamema li estas. En bonaj horoj li estas tre aminda homo — en malbonaj horoj li estas — Satano laŭmodela.

E. R.

Noto de la redakcio — Sendinte al la demandintino la ĉi-supran kritikon, ni ricevis de ŝi la jenan sciigon: „La grafologian skizon mi ricevis kaj petas vin, diri al S-ro grafologo, ke lia esploro estas tre ekzakta kaj tute konforma al la observoj, kiujn mi jam persone faris ĉe „li“. Tial mi volonte rekomendos vian grafologon.“ Dankon pro tiu ĉi komplimento.

Diversaj komunikoj

S-ro H. A. Luyken, aŭtoro de la konataj romanoj originalaj „Paŭlo Debenham“ kaj „Mirinda Amo“ sendis al ni la jenan sciigon pri siaj legindaj verkoj:

„Eble jenaj informoj interesos kelkajn legintojn de mia romano ‚Mirinda Amo‘: La libro estas transskribita relieflitere por blinduloj (same kiel ‚Paŭlo Debenham‘) kaj tradukita en la svedan lingvon. Tradukoj germanen kaj serben ankaŭ komenciĝis. — Mi jam verkis pli ol duonon de tria romano en Esperanto (titolita ‚Patra Heredaĵo‘), en kiu Esperanto ludos gravan rolon.“

≡ Bibliografio ≡

Ĉiuj libroj markitaj per steleto estas riceveblaj per:

Ader & Borel G. m. b. H., Esperanto-Verlag, Dresden-A. 1, Struvestraße 40.

(La montritaj prezoj ne entenas la sendkostejojn, se tio ne estas dirita.)

Ĉi tie ni recenzas nur verkojn duoble ricevitajn.

* **For la batalilojn!** — de *Bertha von Suttner*. El la germana lingvo esperantigita de *Armand Caumont*. (Rekomendita de la Esperantista Literatura Asocio.) 320 pĝ., 14×20³/₄ cm. — Ader & Borel G. m. b. H., Dresden 1914 — Pr: broŝurita 2.50 M (1.250 Sm.), lukse bindita 3 M (1.500 Sm.). [263

Kiam la mondmilito eksplodis, sennombraj esperoj perdiĝis, ĝojoj foriĝis. Ĉi tiu komuna sorto ankaŭ trafis la ĵus eldonitan libron: „For la batalilojn“. Akurate por la Deka Kongreso ĝi estis preta, eleganta volumo kun valora teksto sur bona papero je modera prezo — la sukceso ŝajnis certa, ĉiu kongresano, ĉiu esperantisto ja nepre aĉetos la libron! Kaj nun? Ĉu oni ial kaj iam ĝin aĉetos? Ĉu ĝi ne estas nuligita, malnovigita per la nunaj okazantaĵoj? Ho, kiom necese ni ankoraŭ bezonas la batalilojn, por nin defendi! Krom tio, ni legu la faktojn de la nuna milito en la gazeto, sed ne romanon pri iama batalado! Tia medito trege malhelpis la vendadon de la novaperinta libro. Tamen kelkaj riskis la aĉeton, ili komencis legi — kaj ne povis ĉesi. La malo de la antaŭa opinio okazis. La legado estis trege kontentiga, ĝi fariĝis vera ĝuo. La bonega stilo de la verko, la konversacia formo, la nobla ideo kaptas la leganton. Li multon lernas: la politikan historion de la pasinta jarcento, la surprizan similecon al la nuna okazantaĵo, la suferon kaj la heroismon de la milito. Kiu la unuan fojon legas la verkon, sentas veran surprizon, kaj kiu ĝin jam konas, nur nun ĝin bone komprenas.

Unu tre valora kvalito de la libro estas la jena: ĝi estas legebla por ĉiu nacio! Kvankam germanino ĝin verkis, neniuj aliaj nacioj sin povas senti ofendita. Tion pravas, ke oni tradukis la verkon en multajn lingvojn kaj legis ĝin en ĉiuj landoj. La timo, ke la

≡ Por kolektantoj ≡

Katalogo pri Esperantaj sigelmarkoj

Mallongigoj: E: eldonita; A: aĉetebla ĉe; F: formato; Gr: grandeco de l' bildo (horizontale × vertikale); Pp: papero; Pr: prezo por 100 pecoj; Ss: subspeco aŭ vario; T: teksto; d, md: dekstre, maldekstre; pf: perforita (dentita); s, ms: supre, malsupre.

(13a daŭrigo)

III. Firmoj kaj privatuloj

a) Anglujo

1910

E: Pastro J. Beveridge, Dundee. La kadromarko A, IIa, 1. T: Rev. J. Beveridge, Maybank, Dundee; en la kadro s: Oni korespondas, ms: en Esperanto, d, md: Skotlando. Pp. blanka. F: rektangula. Gr. 32×35 mm, tranĉita

1. Verda

E: Fratoj Malone, Dublin. Verda Esp.-stelo, ore randita sur nigra fundo. T en la stelo (nigra): La Esperanto botpoluro. Malone Bros. Ltd. Dublin; ĉirkaŭ ĝi (verda): Uzado. — Forigu ian koton de la botoj. Ŝmiru iometon de la poluro. Brosu malforte kaj frotu per mola tuko. F: ronda. Gr: 58 mm, tranĉita

2. Verda, nigra, ora

(Daŭrigota)

Dro A. Möbusz

pacifista ideo iel malhelpos patriotismon, ne veriĝis, ĉiuj homoj ja kore deziras pacon kaj tamen kolere ekkaptas la pafilon, kiam la patrujo estas en danĝero.

Tial ni ĉiuj aĉetu kaj legu la bonegan libron ĝuste nun, neniu tion bedaŭros kaj pentos. La legado eĉ estos helpo kaj konsolo.

M. Hankel

* **Deutsch-Esperanto-Wörterbuch für das Rote Kreuz** (Vortaro Germana-Esperanto por la Ruĝa Kruco), bearbeitet von Dr. med. Fr. Uhlmann, sanitara kapitano en la svisa armeo. 43 pĝ., 12×18 cm. — Süd-deutscher Esperanto-Verlag Rud. Abt, G. m. b. H., Schussenried. 1913. Vendado per Ader & Borel G. m. b. H., Dresden.A. 1. — Pr: 0.60 M (0.300 Sm.). [239]

La teknikaj vortaroj plimultiĝas en Esperantujo. Ĉiu tia verko estas konsiderinda ŝtono en la konstruaĵo de lingvo internacia kaj bona helpilo por la verkistoj de sciencaj libroj. La aŭtoro de tiu vortaro por la Ruĝa Kruco estas, kiel sanitara oficiro en la svisa armeo, certe plej kompetenta, kaj la rezulto pro tio estas ĝojiga. Mi zorge travidis la libron kaj devas konstati, ke la fakaj esprimoj pri la tuta sanitara servo estas tre zorge kaj racie elektitaj. Ankaŭ la aranĝo de la materialo laŭ fakoj estas bona, kaj facile oni trovas iun deziratan vorton. Ne nur la Ruĝkrucaĵoj devus posedi en sia libraro tiun verketon, sed ĉiu esperantisto povas ĉerpi el ĝi multe da taŭgaj esprimoj pri malsanoj, flegado, bandaĝado, akcidentoj ktp. Precipe dum la nuna milito la libreto meritas plenan atenton!

Estas dezirinde, ke tiaj vortaroj estu zorge esplorataj de la Esperantista Akademio, antaŭ ol aperos eble novaj en aliaj lingvoj, kun parte aliaj esprimoj por la sama ideo. Oni almenaŭ devus publikigi la novajn vortojn kun traduko en kelkaj naciaj lingvoj, por ke estontaj vortaristoj povu ĉerpi el tiel valora trezoro.

J. Schmid, L. K. — E. L. A.

* **La vero pri la milito** — Oficiala dokumentaro, esperantigita el germana lingvo. Eldonita de Germanaj Esperantistoj. 36 pĝ., 21×27 cm. — Komisia eldono de Esperanto-Centrale, Dresden. 1914. — Pr: 0,50 M (0,250 Sm.). [264]

Ĉi tiu broŝuro estas la unua kajero de la klarigaj bultenoj, kiujn germanaj esperantistoj eldonas pri la nuna mondmilito. La bultenoj havas la celon, disvastigi la veron inter la anoj de la aliaj landoj, precipe de la neŭtralaj. Tio estas necesa, ĉar la malamiko de Germanujo provas kredigi al la mondo, ke Germanujo estas kulpa pri tiu ĉi terura milito, ke ĝi intence rompis la multjaran pacon pro akiremo. Plue oni kulpigas la germanan militistaron pri kruelaj agoj kontraŭ la loĝantoj kaj kontraŭ artaĵoj en la malamikaj landoj ktp. Por tion kontraŭdiri kaj por pruvi la neĝustecon de la diritaj asertoj, la germanaj esperantistoj decidis eldoni klarigajn broŝurojn en Esperanto, sendotajn al alilandaj samideanoj. Ili esperas, ke la eksterlandaj esperantistoj, kun kiuj ili ĉiam havis amikajn interrilatojn, komprenos ilian agon, kiu celas ankaŭ malhelpi la malbonan agitadojn de certaj rondoj en ĉiuj landoj kaj mildigi la troan malamon inter la militantaj nacioj.

La nun preparolata unua kajero enhavas la tradukojn de la jenaj dokumentoj: 1. la tielnomita „Germana Blanka Libro“, kiu enhavas la oficialajn dokumentojn, eldonitajn de la germana registaro, inter ili la telegraminterŝanĝo inter Berlin kaj Peterburgo; 2. la paroladoj de la germana imperiestro kaj de la

kanceliero de la germana imperio; 3. interŝanĝo de telegramoj inter la germana kaj la angla registaroj antaŭ la eksplodo de la milito; 4. raporto pri demonstracio de anoj de neŭtralaj ŝtatoj loĝantaj en Berlin. La sekvontaj „Germanaj Bultenoj“*) enhavos pli novajn oficialajn dokumentojn kaj ankaŭ artikolojn pri la politika kaj ekonomia situacioj en Germanujo. La enhavo de la broŝuroj estas kaj estos verkita kaj tradukita de bonaj kaj lertaj esperantistoj. Ni esperu, ke la broŝuroj trovos bonan akcepton.

F. W.

Universala poŝtmarko — Raporto al la Kvara Kongreso de U. E. A.; verkis Arnold Behrendt. 12 pĝ., 11×15³/₄ cm — Universala Esperanto-Asocio, Genève. 1913 — Prezo ne montrita. [183]

Por la antaŭjara UEA-kongreso nia eminenta samideano detale raportis pri la ĝenerala enkonduko de la universala poŝtmarko, kiu valoras en ĉiuj landoj por egala profito. Sendube la „Uni-marko“ estus unu el la plej grandaj progresoj por la popolaj interrilatoj sur la tero, kaj necesege estas, ke la poŝtaj administracioj fine celu, en la poŝta mondkongreso efektivi tiun ĉi longe deziritan malnovan postulon, kiu ja datumas de la jaro 1874 kaj estas ripetita al la Universalaj Poŝtkongresoj en Paris 1878, en Lisboa 1885 kaj en Wien 1891. En la lasta kongreso la poŝtadministracio de Luksemburgo prezentis detaligitan proponon pri la eldono de internaciaj poŝtmarkoj po 25 kaj 5 centimoj. Tiuj ĉi poŝtmarkoj estus uzablaj nur por internaciaj rilatoj, ne por la naciaj, ili estus fabrikataj de la Universala Poŝt-Unio (U. P. U.) en Bern kaj vendataj por ĉiuj landoj. La tiama ŝtatestretario de la germana poŝtadministracio ne tute kontraŭstaris la kreon de tia universala poŝtmarko, sed li opiniis, ke la tempo por ĝi ankoraŭ ne estas veninta. Tio ja estas klarigebla, sed se li estus koninta la nunan Esperantan movadon tra la tuta mondo, li certe interkonsentus kaj subtenus la proponon. La malgranda broŝuro estas sendube tre grava por efektivi la enkondukon de la „Uni-poŝtmarko“, kaj ni povas esti al nia fervora, senlaca samideano tre dankaj pro tio, ke li montras al la civilizita mondo la ĝustan vojon, per nia lingvo Esperanto fine atingi la celon; la internacia respondkupono kaj la spemila sistemo jam ekzistas, kaj la kreo de la Uni-poŝtmarko nur povas esti tempa demando, ĉar la mondaj interrilatoj kreskas pli kaj pli. Kiu deziras studi la montran broŝuron skribu al la Centra Oficejo de UEA aŭ al la Oficejo de la Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝtoficejoj (Ilepo), Breslaŭ 16, Maxstr. 22.

Tacitulo

Praktika Esperanta Lernolibro por ĉiuj landoj de Julio M. Rosenörn. 16 pĝ., 15¹/₂×20¹/₂ cm — Eldonita de la revuo „Homaro“, Pasaje del Comercio 8, Madrid (Hispanujo). 1914 — Pr: 2 respondkuponoj. [211]

S-ro Kapitano J. M. Rosenörn en Madrid lerte kunigis diversajn temojn por sia nova lernolibro konsistanta el 14 lecionoj, per kiuj la instruanto povas instrui nur laŭ la Berlitz'a metodo, do per nura interparolado, per demandoj kaj respondoj. Temojn por ili liveras la libreto; mi citu nur kelkajn subtitolojn: Sur la strato; Tempo; Horloĝo; Mi skribas leteron; Iri en kafejon; Iri en teatron; Ekskurso al marbordo; Mi vizitas la urbon, la muzeon, la ŝipon; ktp.

*) Vidu la koncernan anoncon en la anonca parto de tiu ĉi numero. La red.

Nur la eksteraĵo ne plaĉas al mi: la formato estas tro granda por la malamplekso de la broŝureto 16-paĝa, kaj la papero tute senvalora — bedaŭrinde.


Por instruantoj laŭ Berlitz'a metodo la nova libreto estas rekomendinda.

Charl. Pulvers (L. K., E. L. A.)

≡ Por lertuloj ≡

Enigmoj kaj problemoj

No. 22



Ordigu la literojn tiel, ke la horizontalaj vicoj nomu: 1. vokalon, 2. familianon, 3. nutraĵon, 4. araban veston, 5. spicaĵon; la meza vertikala vico tiam nomos grenspecon.

Ernst Hudetzka

No. 23

Mi estas kreskaĵo; eligu literon k, kaj mi estos besto.

E. Rödiger

No. 24

Anagramo

1	7	7	9	7	10	11	15	16	7	profesiano
2	9	11	10	2	16	7	17	7		granda rampulo
3	4	13	7							birdo
4	14	7	5	7						lingnospeco
5	2	15	7							fiskaptilo
6	2	17	11	5	10	7				fiŝo
7	18	2	9	7						juvelo
8	2	13	7							haŭtmalsano

Anstataŭu la ciferojn per literoj tiel, ke la unua vico — legata de supre al malsupre — montras fame konatan viron, kaj la tria vico — legata de malsupre al supre — la urbon, en kiu li loĝas.


Tele

En la venonta numero de eldono B ni publikigos la solvojn de la ĉi-supraj problemoj. La divenintoj bonvolu sendi la solvojn, **skribitajn nur sur poŝtkarto sen iu alia komuniko**, ĝis la 5a de l' venonta monato al nia redaktoro, **Friedrich Ellersiek**, Wissmannstr. 46, Berlin S. 59. — Tri el la solvintoj ricevos libropremion, kiun ili povos elekti el la katalogo de nia eldonejo. (Valoro de ĉiu premio ĝis 1 Sm.)


La gajnontoj bonvolu sciigi al nia eldonejo, **Ader & Borel G. m. b. H.**, Dresden-A. 1, Struvestr. 40, la librojn, de ili deziratajn.

Solvoj el la antaŭa numero

No. 19



No. 20



No. 21

upupo — pupo*)

Ĝustajn solvojn sendis

1) de ĉiuj numeroj: Johannes Bauer, Godesberg; F-ino K. Bock, Neukölln; Richard Brüggemann, Berlin; M. Butin, Tyrstruphof; W. Daum, cand. phil., Bonn; O. Demmler, Erfurt; F-ino M. Dreesbach, Godesberg; Walter Falke, paroĥa helpanto, Löbau i. Sa.; Max Fischer, fervojasistanto, Weida; August Großmann, Breslau; F-ino Elisabeth Höppner, Rostock; A. Ivanickij, St. Peterburgo (Rusujo); Th. Kempe, Radebeul-Oberlößnitz; F-ino Alwine Körner, Braunschweig; F-ino Margarete Lachmund, Leisnig; E. Momber, Honnef; Dro Müller, Nordhausen; Theodor Oster, Godesberg; Wilh. Schimmel, kant. em., Dresden; Dro Schmidt, Wittenberg; Joseph Sommer, Lippstadt; F-ino Käthe Stein, Essen a. Ruhr; A. Tietze, Friedland (Bohemujo); E. Ulitzsch, instruisto, Gera (Reuŝ).

2) de du numeroj: Richard Dertsch, cand. germ., Apfeltrang; Otto Hempel, pastro, Lobstädt; F. Schimhofer, fakinstruisto, Brünn (Aŭstrio).

3) de unu numero: F-ino Henny Drückhammer, Lübeck; Carl Handrich, Hellerau.

*

La premiojn gajnis per loto: S-ro M. Butin, Tyrstruphof; S-ro W. Daum, Bonn; S-ro A. Tietze, Friedland (Bohemujo).

*) Kelkaj lertuloj solvis la enigmon per *fringo* — *ringo*. Ĉi tiujn vortojn ni ne povis konsideri ĝustaj, ĉar laŭ nia modesta opinio *ringo* ne estas ludilo, precipe ne, se ĝi estas edziĝa *ringo*. Ĉi ne vere?
La red.

